

Fina raporto de la Elekta Komisiono

Elekto de estraro por la mandato 2020-2021

La raporton pretigis la Elekta Komisiono en jena konsisto:

Hans Becklin
Oleksandra "Sasha Murr" Kovyazina
Francesco Maurelli
Ana Ribeiro
Łukasz Żebrowski

Ephrata, Brajtono, Bremeno, Campina Grande, Varsovio
la 27-an de junio 2020

Enhavtabelo

Enhavtabelo	1
Enkonduko	4
Kandidatoj	5
Kandidatoj por la posteno de Prezidanto	5
Carlos Pesquera Alonso	5
Charlotte Scherping Larsson	5
Konkludo pri kandidatoj por prezidanteco	5
Kandidatoj por la posteno de Kasisto	5
BUI Hai Mung (Feliĉa)	5
Kandidatoj por la posteno de Ĝenerala Sekretario	6
Rogier Huurman (Roĉjo)	6
Konstanze Schönfeld (Tuška)	6
Konkludo pri la kandidatoj por Ĝenerala Sekretario	7
Kandidatoj por la posteno de Vicprezidanto	7
Rogier Huurman (Roĉjo) kaj Carlos Pesquera Alonso	7
Manuela Burghilea	7
André Pagaime	7
Tomáš Stano (Tomaŝ)	8
Konkludo pri la kandidatoj por vicprezidanteco	8
Kandidatoj por senofica estraraneco	8
Manuela Burghilea, Rogier Huurman (Roĉjo), André Pagaime, Carlos Pesquera Alonso, Tomáš Stano	8
Charlotte Burton	9
Klára Ertl	9
Nicolas Kasolene Kakule (Nickson)	9
Robert Nielsen	9
Karina Gonçalves de Souza de Oliveira	10
Konkludo pri kandidatoj por senofica estraraneco	10
Konsisto de la estraro	11
Nombro de estraranoj	11
Nombro de vicprezidantoj	11
Proponoj pri estraraj teamoj	12
9-personaj estraraj teamoj kun Charlotte kiel prezidanto	14
Propono 1.1.1 (Charlotte prezidanto, 9-kapa estraro)	14
Propono 1.1.2 (Charlotte prezidanto, 9-kapa estraro)	14

Propono 1.1.3 (Charlotte prezidanto, 9-kapa estraro)	15
Propono 1.1.4 (Charlotte prezidanto, 9-kapa estraro)	15
Propono 1.1.5 (Charlotte prezidanto, 9-kapa estraro)	16
Propono 1.1.6 (Charlotte prezidanto, 9-kapa estraro)	16
8-personaj estraraj teamoj kun Charlotte kiel prezidanto	17
Propono 1.2.1 (Charlotte prezidanto, 8-kapa estraro)	17
Propono 1.2.2 (Charlotte prezidanto, 8-kapa estraro)	17
Propono 1.2.3 (Charlotte prezidanto, 8-kapa estraro)	18
Propono 1.2.4 (Charlotte prezidanto, 8-kapa estraro)	18
Propono 1.2.5 (Charlotte prezidanto, 8-kapa estraro)	19
7-personaj estraraj teamoj kun Charlotte kiel prezidanto	19
Propono 1.3.1 (Charlotte prezidanto, 7-kapa estraro)	19
Propono 1.3.2 (Charlotte prezidanto, 7-kapa estraro)	20
Propono 1.3.3 (Charlotte prezidanto, 7-kapa estraro)	20
Propono 1.3.4 (Charlotte prezidanto, 7-kapa estraro)	21
Propono 1.3.5 (Charlotte prezidanto, 7-kapa estraro)	21
9-personaj estraraj teamoj kun Carlos kiel prezidanto	22
Propono 2.1.1 (Carlos prezidanto, 9-kapa estraro)	22
Propono 2.1.2 (Carlos prezidanto, 9-kapa estraro)	22
8-personaj estraraj teamoj kun Carlos kiel prezidanto	23
Propono 2.2.1 (Carlos prezidanto, 8-kapa estraro)	23
Propono 2.2.2 (Carlos prezidanto, 8-kapa estraro)	23
Propono 2.2.3 (Carlos prezidanto, 8-kapa estraro)	24
7-personaj estraraj teamoj kun Carlos kiel prezidanto	24
Propono 2.3.1 (Carlos prezidanto, 7-kapa estraro)	24
Propono 2.3.2 (Carlos prezidanto, 7-kapa estraro)	25
Propono 2.3.3 (Carlos prezidanto, 7-kapa estraro)	25
Propono 2.3.4 (Carlos prezidanto, 7-kapa estraro)	26

I. Enkonduko

Estimataj komitatanoj,

Ni prezentas al vi la finan raporton pri nia laboro rilate al la estrarelekto por la oficperiodo 2020-2021. La proceduro okazas surbaze de la [Reglamento pri elekto de estraranoj](#) laŭ kiu la Elekta Komisiono serĉas kandidatojn por la Estraro, akceptas kandidatiĝojn, sekve esploras, ĉu kandidato estas taŭga por posteno en la estraro kaj rekomendas tiun aŭ eventuale rekomendas ekster-estraran postenon.

La Elekta Komisiono serĉis kandidatojn al la estraro pere de malferma alvoko kaj ankaŭ persone kontaktante diversajn aktivulojn, kiujn konis membroj de la komisiono mem aŭ kiuj estis rekomenditaj de aliaj homoj. Sume ni interparolis kun pli ol trideko da TEJO-aktivuloj. El tio rezultis 13 kandidatiĝoj de personoj el 5 kontinentoj. Sep el la kandidatoj estas virinoj, 6 estas viroj. Ĉiuj kandidatiĝoj estas validaj laŭ nia reglamento. Kelkaj el la homoj kun kiuj ni parolis ŝatus engaĝiĝi en TEJO en komisiono aŭ interesgrupo. Tial ni komunikos tiujn nomojn al la elektota estraro kaj invitas ĝin kunlabori kun ili.

En la dua parto de ĉi tiu dokumento vi trovos skize resumitajn niajn rimarkojn pri la kandidatoj. Tiuj rimarkoj estas verkitaj laŭeble koncize kaj ne enhavas bazajn informojn pri la kandidatoj. Tiujn vi trovos en iliaj kandidatiĝaj dokumentoj - vivresumoj kaj motivigaj leteroj. Tial, por vere konsciiĝi pri la kandidatoj nepras konatiĝi kun ambaŭ - ĉi tiu raporto kaj dokumentoj liveritaj de la kandidatoj, kiuj estas en aldono al ĉi tiu raporto.

En la tria parto vi trovos nian rekomendon pri grandeco de la estrara teamo kaj ankaŭ pri nombro de vicprezidantoj.

En la plej longa, kvara parto, estas listigitaj pluraj (sed tute ne ĉiuj!) eblaj kombinoj de estraraj teamoj, kiuj enhavas ankaŭ sugestojn pri eventuala distribuo de estraraj fakoj.

Konsciante ke ĉi tiu dokumento estas ampleksa, je la fino ni prezentas resumon kaj finan konkludon.

II. Kandidatoj

Kandidatoj por la posteno de Prezidanto

Por la posteno de Prezidanto kandidatiĝis du personoj: Carlos Pesquera Alonso kaj Charlotte Scherping Larsson. Charlotte kandidatiĝis nur por la posteno de Prezidanto. Carlos, kaze de sia neelektiĝo kiel Prezidanto, kandidatiĝis ankaŭ por vicprezidenteco aŭ senofica estraraneco.

Carlos Pesquera Alonso

Carlos estas homo gvidkapabla, energia, entuziasma kaj iniciatema. Tion li jam montris plurfoje per sia agado kaj certe li povus esti bona prezidanto de TEJO. Aliaj kandidatoj pozitive sinesprimis pri eventuala kunlaboro kun li, kiel Prezidanto. La Elekta Komisiono rekomendas Carlos kiel taŭgan kandidaton por prezidenteco kaj ankaŭ vicprezidenteco kaj ankaŭ senofica estraraneco.

Charlotte Scherping Larsson

Dum niaj interparoloj kun eventualaj kandidatoj pluraj homoj menciis Charlotte kiel la plej taŭgan kandidaton por iĝi Prezidanto de TEJO. Krom jama sperto kiel estrarano, ŝi ankaŭ laŭkaraktere tre taŭgas por ĉi tiu aparta rolo. Charlotte estas forta persono havanta gvidajn kapablojn, sed samtempe estas tre diplomatia, nekonfliktema, kapabla labori kun ĉiuj kaj ankaŭ kunlaborigi aliajn. Aliaj kandidatoj pozitive sinesprimis pri eventuala kunlaboro kun ŝi, kiel Prezidanto. Elekta Komisiono rekomendas ŝin kiel taŭgan kandidaton por prezidenteco.

Konkludo pri kandidatoj por prezidenteco

Ambaŭ kandidatoj havas la rekomendon de la Elekta Komisiono kiel kandidatoj taŭgaj por plenumi la oficon de Prezidanto. Ni tamen esprimas nian preferon, identan al la prefero de la plejmulto de alparolitaj aktivuloj, ke aktuale Charlotte estas pli taŭga por ĉi tiu rolo.

Kandidatoj por la posteno de Kasisto

BUI Hai Mung (Feliĉa)

Feliĉa estas la sola kandidato por ĉi tiu posteno. Tio estas la ununura el la postenoj por kiuj la Komitato efektive ne havas elekton. Ni tamen ne taksas tion problema, ĉar ne estas pro tio, ke mankis interesiĝantoj por labori kiel kasisto. Manko de aliaj kandidatoj fontas el tio, ke ĉiuj, kiuj iel interesiĝas pri ĉi tiu fako esprimis plenan subtenon al ĝisnuna laboro de Feliĉa kaj preferis, ke, se ŝi pretas, ŝi daŭrigu en ĉi tiu rolo en sekva

oficperiodo. Ankaŭ ŝiaj ĝisnunaj kunlaborantoj rekomendas Feliĉan senkondiĉe. La Elekta Komisiono havas la saman opinion kaj plene rekomendas ŝin kiel taŭgan kandidaton por la posteno de Kasisto. Samtempe ni kolektis kelkpersonan liston de homoj interesitaj eventuale iĝi kasisto estonte. Ĉi tiu grupeto povus en sekva oficperiodo kunlabori kun Feliĉa kaj lerni de ŝi celante estontece transpreni la taskojn en glata maniero.

Kandidatoj por la posteno de Ĝenerala Sekretario

Por posteno de Ĝenerala Sekretario kandidatiĝis du personoj: Rogier Huurman (Roĉjo) kaj Konstanze Schönfeld (Tuŝka). Tuŝka kandidatiĝis nur por la posteno de Ĝenerala Sekretario. Aldone al tio, ŝia kandidatiĝo kondiĉas la elektiĝon de Charlotte kiel Prezidanto. Roĉjo, kaze de neelektiĝo kiel Ĝenerala Sekretario, kandidatiĝis ankaŭ por vicprezidenteco aŭ senofica estraraneco.

Rogier Huurman (Roĉjo)

Roĉjo, kvankam li antaŭe neniam estis estrarano, havas tre riĉan sperton ene de TEJO, kiun li povus bone uzi por subteni aktivulojn en TEJO. Li havas ankaŭ bonan konon de la fundamentaj dokumentoj de nia organizaĵo. Ne eblas ankaŭ ne rimarki lian engaĝiĝon, kiun li prezentas kiel tre aktiva kandidato. Sendube li estas homo prezentiĝema, emanta ricevi atenton. Certe povas (kaj volas) fari bonan kampanjon pri si mem. Tio ne estas trajto, kiun oni aparte bezonas en la posteno de Ĝenerala Sekretario, sed, tiuj kapabloj estas tre utilaj en aliaj kampoj, kiel informado, merkattiko aŭ ekstraj rilatoj. Ĉio ĉi kaŭzas, ke Roĉjo estas bona kandidato kaj havas la rekomendon de la Elekta Komisiono kiel taŭga homo por la rolo de Ĝenerala Sekretario kaj ankaŭ por vicprezidenteco kaj ankaŭ por senofica estraraneco.

Aldona rimarko. Dum la laboro de la elekta komisiono okazis incidento, kiu iom subfosis nian fidon al Roĉjo. Dum la intervjuoj ĉiuj kandidatoj interalie ricevis liston de homoj kandidatiĝintaj al la estraro kun rimarko, ke temas pri informoj konfidencaj ĝis la apero de ĉi tiu raporto. Kun surprizo ni eksciis, ke Roĉjo transdonis ĉi tiun liston al la redaktoro de Libera Folio. Se iu entute eventuale transdonu tian liston al ĵurnalistoj, tion certe faru la Elekta Komisiono, kiun elektis la komitato por prizorgi kandidatiĝojn sianome, kaj ne individua kandidato, kiu estis petita trakti la informon konfidence. Tiu ago certe montras respekton nek al la organiza strukturo de TEJO (kio devus aparte gravi por Ĝenerala Sekretario) nek al la aliaj kandidatoj. Malgraŭ ĉi tiu bedaŭrindaĵo ni esperas, ke Roĉjo povos valore kontribui al la agado de TEJO. Kvankam ni taksas ĉi tiujn informojn bezonataj de la komitato por ĝia decido, ili ne ŝanĝigas nian rekomendon.

Konstanze Schönfeld (Tuška)

Tuška estas persono kiu havas plurjaran kaj tre diverskampan sperton en TEJO. Danke al tio, ŝi taŭgas por rolo, en kiu oni povas engaĝi kaj subteni aliajn aktivulojn. Ŝi jam pli frue estis Ĝenerala Sekretario de TEJO kaj tiun rolon ŝi plenumis tre bone laŭ ĉiu raporto. Kiel bone ordigita persono al ĉi tiu rolo ŝi vere taŭgas. Pluraj el alparolitaj aktivuloj menciis ŝin kiel la plej taŭgan kandidaton por la posteno de Ĝenerala Sekretario. La Elekta Komisiono rekomendas ŝin kiel taŭgan kandidaton por la rolo de Ĝenerala Sekretario.

Konkludo pri la kandidatoj por Ĝenerala Sekretario

Ambaŭ kandidatoj havas la rekomendon de la Elekta Komisiono kiel kandidatoj taŭgaj por la posteno de Ĝenerala Sekretario. Ni tamen esprimas nian preferon kaj ankaŭ la preferon de pluraj alparolitaj aktivuloj, ke aktuale Tuška estas pli taŭga por ĉi tiu rolo kaj ke ŝi estas tiu, kiu pli bone faros laboron de Ĝenerala Sekretario. Krome, ni aldonu la fortan rekomendon de kandidato por prezidanteco, Charlotte Scherping Larsson, por Tuška kiel Ĝenerala Sekretario de TEJO.

Kandidatoj por la posteno de Vicprezidanto

Por la posteno de Vicprezidanto kandidatiĝis kvin personoj: Manuela Burghelea, Rogier Hurman (Roĉjo), André Pagaime, Carlos Pesquera Alonso kaj Tomáš Stano. La kandidatiĝoj de Carlos Pesquera Alonso kaj Rogier Hurman (Roĉjo) estas aktualaj nur kondiĉe ke ili ne elektiĝos, respektive, kiel Prezidanto aŭ Ĝenerala Sekretario. Kaze de ne elektiĝo kiel Vicprezidanto ambaŭ estas kandidatoj ankaŭ por senofica estraraneco.

Rogier Hurman (Roĉjo) kaj Carlos Pesquera Alonso

Iliaj kandidatiĝoj estas jam supre priskribitaj en nia raporto. Ambaŭ havas la rekomendon de la Elekta Komisiono ankaŭ por la ofico de vicprezidanto aŭ de senofica estrarano.

Manuela Burghelea

Manuela ekagadis por TEJO pro sia volontulado en Roterdamo. Ŝi ankaŭ volontulis en Tuluzo kaj havas sperton en la Brazila movado ĉar ŝi antaŭe loĝis tie (kaj planas reiri tien por akademie esplori tuj tiam, kiam la kondiĉoj permesos). Nuntempe ŝi doktoriĝas pri temo rilata al Esperanto kaj povas dediĉi sin plentempe al nia lingvo. Ni kredas, ke Manuela havas kapablon por iĝi kaj vicprezidanto de TEJO kaj senofica estrarano, do ŝi havas rekomendon de la Elekta Komisiono por ambaŭ postenoj..

André Pagaime

André eksciis pri esperanto en 2018 kaj ekde tiam li lernas esperanton per interreto. Kun ĝojo ni bonvenigas lian entuziasmon kaj engaĝiĝemon, sed samtempe kredas ke André bezonas unue spertiĝi kaj lingve kaj movade antaŭ ol iĝi Estrarano de TEJO. Certe kun taŭga mentorado, li povos valore kontribui al agado de TEJO estonte kaj specife kadre de la landa movado en Portugalio (kies landa sekcio de TEJO pretas por sepultado). Aktuale nia rekomendo estas ne elekti lin, nek kiel vicprezidanton, nek kiel senofican estraranon, sed ni rekomendas al la estraro inviti lin kontribui en komisiono(j) aŭ interesgrupo(j).

Tomáš Stano (Tomaš)

Tomaš estas sperta aktivulo, kiu havas bonajn kompetentojn precipe en la kampoj de aktivula trejnado kaj kongresoj. Li estas homo, kiu ne kreas bruon ĉirkaŭ si, sed simple silente kaj bone faras sian laboron. Ni fidas, ke same bonan laboron li povus fari ankaŭ en nia estraro. Krom baze ricevitaj taskoj, Tomaš pretus ankaŭ roli kiel neformala "vickasisto" (aŭ unu el la teamo de "vickasistoj"), kiu sub la gvidado de Feliĉa lernus pri ĉi tiu kampo por eventuale transpreni la taskojn en glata transdono. Li aparte taŭgas por ĉi tiu tasko pro sia eduko en financa kampo. Tomaš pretas kandidatiĝi por la rolo de Vicprezidanto (tamen preferus ne esti la unua Vicprezidanto) kaj de senofica estrarno. Por ambaŭ tiuj postenoj li havas la rekomendon de la Elekta Komisiono.

Konkludo pri la kandidatoj por vicprezidenteco

El 5 kandidatoj por vicprezidenteco 4 havas rekomendon de la Elekta Komisiono. El ĉi tiu listo la komitato devos elekti 1 aŭ 2 aŭ 3 vicprezidentojn. Se ĉiuj kandidatiĝoj estos daŭre validaj (t.e., neniuj estos elektiĝintaj en pli altan oficon), je la komenco de la voĉdono, la elekto certe ne estos facila. Je la publikigo de ĉi tiu raporto, la Elekta Komisiono povas sugesti ke en nia opinio oni prefere elektu Carlos kiel la unuan Vicprezidanton kaj Tomaš aŭ Manuela kiel la duan. Tamen, kaze ke la ĵus elektita Prezidanto de TEJO esprimos iun preferon pri siaj Vicprezidentoj dum la komitataj kunsidoj, ni rekomendas, ke la komitato sekvu tiun rekomendon por garantii kiel eble plej harmonian konsiston de la estraro.

Kandidatoj por senofica estraraneco

Por senofica estraraneco kandidatiĝis dek personoj: Manuela Burghelea, Charlotte Burton, Klára Ertl, Rogier Huurman (Roĉjo), Nicolas Kasolene Kakule (Nickson), Robert Nielsen, Karina Gonçalves de Souza de Oliveira, André Pagaime, Carlos Pesquera Alonso kaj Tomáš Stano. La kandidatiĝoj de Manuela Burghelea, Rogier Huurman (Roĉjo), André Pagaime, Carlos Pesquera Alonso kaj Tomáš Stano estas aktualaj nur kondiĉe ke ili pli frue ne elektiĝos kiel Prezidanto aŭ Ĝenerala Sekretario aŭ Vicprezidanto.

Manuela Burghilea, Rogier Huurman (Roĉjo), André Pagaime, Carlos Pesquera Alonso, Tomáš Stano

Iliaj kandidatiĝoj estas supre priskribitaj. Krom André Pagaime, ĉiuj aliaj havas la rekomendon de la Elekta Komisiono ankaŭ por la rolo de senofica estrarano.

Charlotte Burton

Charlotte estas kandidato, kiu havas grandan sperton ekster TEJO, sed estas neofito en TEJO.. Ŝi jam iomete konas la strukturon de TEJO pro sia partoprenado en komitatkunsidoj dum IJK pasintjare, sed laŭ ĉies takso certe bezonas pli da scio pri la interna funkciado de TEJO simple pro manko de longdaŭra agado en ĝi. Karaktere, ŝi estas bone organizita kun abundo de iniciativo, montrita dum jaroj en sia landa agado. Aldone al tio, ŝi alportas perspektivon de pli vasta lando kaj la taktikojn, kiuj pli bone kunigas la junularon tie. Pro tio, ni rekomendas Charlotte kiel kandidaton por estraraneco.

Klára Ertl

Klara estas kandidato, kiu perfekte taŭgus por respondi pri homaj rimedoj de TEJO - agadkampo Talento, subtenado de volontuloj, mentora programo. Kun sia eduko kiel psikologo ŝi povus bone prizorgi aktivulojn de TEJO, ilian engaĝadon kaj evoluon. Niatakse estrarano kun tia kompetento tre utilis por TEJO, ĉar aktivuloj en la organizo ne mankas - mankas ilia taŭga gvidado kaj konektado kun taskoj, kiuj ja ankaŭ ne mankas. Aldone, Klara havas ankaŭ sperton en la kampo de eksteraj rilatoj (pri kio ŝi povus plu kunlabori) kaj ankaŭ pretus subteni Feliĉan kiel unu el neformalaj "vickasistoj" eventuale estonte transprenontaj la taskojn. La Elekta Komisiono rekomendas Klara kiel taŭgan kandidaton por estraraneco.

Nicolas Kasolene Kakule (Nickson)

Nickson estas kandidato, kies longdaŭran engaĝiĝon estas rimarkinda, precipe en la kampo de edukado, en kiu li aktivis ekde 2015 sialande kaj en Ruando. Profesie, li estas komputikisto, kaj povos alporti sciojn pri kiel plej bone atingi Esperantistojn per novaj teknologiaj rimedoj, precipe en evoluantaj landoj kie ekzistanta reto de aktivado ne ekzistas. Por iu ne oficinta en TEJO antaŭe, li havas bonan komprenon de la strukturo kaj celoj de la organizaĵo, sed ankaŭ li konsentas, ke li bezonas pli da sperto pri ĝia efektiva funkciado. Persone, ni trovis lin tre engaĝita, afabla, laborpreta, kaj talenta. Ni rekomendas Nickson kiel kandidaton por estraraneco.

Robert Nielsen

Robert estas kandidato pri kiu multaj alparolataj aktivuloj efektive havis dubojn. Evidente videblas lia laboremo kaj engaĝiĝo en la komitato, tamen nemalmultaj timas, ke li povus esti tro disputema en la estraro, detruante tiel kunlaboretoson kaj malfaciligante

kunlaboron. Ni, kiel la Elekta Komisiono devas diri, ke nia impresoj pri la kandidatiĝo de Robert estas tute pozitiva. Li havas sufiĉe klaran vizion pri tio kion li volus fari specife en la kampo de landa agado. Nia opinio li ankaŭ signifas ŝanĝis sian sintenon rilate al partopreno en diskutoj kaj disputoj. Ni kredas, ke elektiĝinte kiel estraro Robert povas tre pozitive surprizi tiujn, kiuj nuntempe havas dubojn pri li. Se temas pri eventuala kritikemo, laŭ nia sperto ni opinias, ke estas signifas pli bone havi internan konstruan kritikon ene de la estraro ol ricevi ĝin de ekstere. Interna kritiko permesas pli bone evoluigi la ideojn dum ilia prilaborado en malpli granda grupo, antaŭ ol ili iĝos pretaj publike prezentitaj decidoj aŭ oficialaj proponoj starigitaj antaŭ la komitato. Tial, laŭ ni estus pli valore por TEJO, ke tiel engaĝita aktivulo kiel Robert prefere kontribuu de la estraro ol de ekstere. La Elekta Komisiono rekomendas Robert kiel taŭgan kandidaton por estraraneco.

Karina Gonçalves de Souza de Oliveira

Karina (kune kun Feliĉa) estas la plej fortaj partoj de la aktuala Estraro de TEJO. Ĉiuj nunaj kunlaborantoj kun kiuj ni interparolis laŭdis ŝian laboron kaj forte rekomendis, ke ŝi daŭrigu ĝin en la sekva estraro, prefere en ofico de Vicprezidanto. Tamen, pro planata finiĝo de ŝia doktoriĝo, Karina aktuale povas nur preni la rolon de senofica estrarano. Ŝia kandidatiĝo havas, kompreneble, la plenan subtenon de la Elekta Komisiono kaj, kiel rimarkigite, ankaŭ la fortan subtenon de pluraj TEJO-aktivuloj.

Konkludo pri kandidatoj por senofica estraraneco

Sendepende de la nombro de vicprezidantoj kaj la grandeco de la estraro, la komitato havas neordinaran abundon de altkvalitaj, pruvitaj kandidatoj ankaŭ por la posteno de senofica estrarano. Precize, depende de antaŭaj elektoj por pli altaj postenoj, la komitato havas naŭ rekomendatajn kandidatojn maksimume por maksimume kvin lokoj. Malgraŭ tio, ke multaj ricevis nian aprobon kaj rekomendon, unu homon kandidatiĝintan nur por ĉi tiu posteno ni taksas malfacile anstataŭebla, nome Karina Gonçalves de Souza de Oliveira. Ŝia gvidado en la nuna estraro donos daŭripovon al ĝia laboro post la fino de la nuna mandato, se ŝi elektiĝos en la novan. Daŭripovo estas trajto de ĉiu funkcia organizaĵo, kaj aparte malfacile atingebla sen granda kvanto de rekandidatiĝintoj.

En la subaj tabeloj ni montras diversajn eblojn por la disdivido de fakoj, kaj ĉiuj rekomenditoj trovas lokon en unu el ili. Decidi inter ili estos malfacile, sed ĉiuj kandidatoj esprimis kaj sian pretecon trovi alian lokon en TEJO, kaze de neelekto, por daŭre maturiĝi kaj servi en TEJO.

III. Konsisto de la estraro

Nombro de estraranoj

Diskutante inter ni kaj ankaŭ kun kandidatoj ni konstatis, ke pluraj homoj diras pli malpli la samon: principe mi ne aparte subtenas teamon tiom grandan kiel 9-persona, sed vidante ĉi tiun liston de kandidatoj tio vere povas funkcii ĉi-kaze. Iuj kandidatoj ankaŭ tuj diris, ke ju pli multe, des pli bone. Tion konstatinte, ni rekomendas al la komitato elekti 9-kapan estraron, eventuale 8-kapan kaj plej malbonkaze 7-kapan. Ni forte malrekomendas elekti malpli grandan konsiston de la estraro. Unue, ĉar lastatempaj tiaj spertoj de TEJO ne donis bonan rezulton kaj due, ĉar estus vere bedaŭrinde devi rezigni de pli da kandidatoj ol ĉiukaze necesas.

Nombro de vicprezidantoj

Rekomendante 9-kapan (eventuale 8- aŭ 7-kapan) estraron ni taksas, ke optimuma nombro de vicprezidantoj estus 2. La Statuto de TEJO permesas havi de unu ĝis 3 vicprezidantojn. Nia opinio devus esti iu specifa kialo por havi ankoraŭ trian vicprezidanton (tiom alportus ses ofico-tenantojn en maksimume 9-persona skipo) kaj tiun kialon ni aktuale ne vidas pro la kvalito de la kandidatoj. Do, la teamo kun 2 Vicprezidantoj (t.e. 5 ofico-tenantoj) en 9-kapa estraro estas nuntempe solvo optimuma kaj tiun ni rekomendas al la Komitato.

IV. Proponoj pri estraraj teamoj

En ĉi tiu parto de nia raporto vi trovos diversajn proponojn pri eblaj konsistoj de la estraro. Kompreneble ekzistas signife pli da tiaj eblaj kombinoj kaj estas simple neeble prezenti ilin ĉiujn, sed ni esperas, ke tiuj, kiujn ni montras sufiĉe helpas por imagi kiel povus distribuiĝi taskaro inter diversaj estraranoj. Prezentitaj distribuoj de fakoj estas nur ekzemplaj kaj oni ne traktu ilin kiel ion ajn firman. Pri fina distribuo de taskoj decidu la elektota teamo mem. Niaj proponoj rolu nur kiel helpo al la komitato, precipe pro la abundo de kvalitaj kandidatoj.

En apartaj sekcioj vi trovos teamproponojn kun Charlotte kaj kun Carlos kiel prezidantoj. Pro kunlaborpreferoj de la kandidatoj, ĉiuj teamoj kun Charlotte kiel Prezidanto enhavas ankaŭ Feliĉa kiel Kasiston kaj Tuŝka kiel Ĝeneralan Sekretarion. La cetero de la estraro varias. Simile ĉe teamoj kun Carlos kiel Prezidanto; sekvas lin Feliĉa kiel Kasisto kaj Roĉjo kiel Ĝenerala Sekretario. La cetero de la estraro varias (tamen, pro siaj kondiĉoj, Charlotte S. L. kaj Tuŝka ne plu aperas en la kombinoj). Kvankam la Komitato evidente rajtas fari kiun ajn elekton, ni forte rekomendas kune elekti inter tiuj du kernaj triopoj: Charlotte-Feliĉa-Tuŝka aŭ Carlos-Feliĉa-Roĉjo. En la proponoj mankas André al kiu ni rekomendas unue spertiĝi en aliaj roloj en TEJO.

Ĝenerale, la estraraj proponoj estas konstruitaj surbaze de la jenaj du ĉefaj strukturoj:

1. Teamstrukturo kun Charlotte S. L. kiel prezidanto:

- Prezidanto: Charlotte S.L;
- Kasisto: Feliĉa;
- Ĝenerala Sekretario: Tuŝka;
- Vicprezidantoj: elekto de 2 el:
 - Manuela,
 - Roĉjo,
 - Carlos kaj
 - Tomaŝ;
- Estraranoj:
 - Karina;
 - kaj elekto de 1 ĝis 3 el:
 - Tomaŝ (kaze ne elektita kiel VP);
 - Roĉjo (kaze ne elektita kiel VP);
 - Manuela (kaze ne elektita kiel VP);
 - Charlotte B.;
 - Klára;
 - Nickson;
 - Robert

2. Teamstrukturo kun Carlos kiel prezidanto:

- Prezidanto: Carlos;
- Kasisto: Feliĉa;
- Ĝenerala Sekretario: Roĉjo;
- Unua vicprezidanto: Manuela;
- Dua vicprezidanto: Tomaŝ;
- Estraranoj:
 - Karina;
 - kaj elekto de 1 ĝis 3 el:
 - Charlotte B.;
 - Klára;
 - Nickson;
 - Robert

En la tabeloj, en la unua kolumno troviĝas postenoj (Pos.) kun jenaj mallongigoj:

- P - Prezidanto
- K - Kasisto
- ĜS - Ĝenerala Sekretario
- VP1 - Unua Vicprezidanto
- VP2 - Dua Vicprezidanto
- E - estrarano (senofica)

Inter la proponataj estraraj fakoj troveblas plurloke esprimo "Eksteraj Rilatoj (parte)". Ĝi fontas el tio, ke inter la kandidatoj estas neniu kiu vere de si mem volus kaj interesiĝus transpreni ĉi tiun kampon plene. Ni ne traktas ĉi tion kiel problemon, ĉar Komisiono pri Eksteraj Rilatoj estas aktivulriĉa kaj bone funkcia. Tial ni proponas ke la elektota teamo (interkonsente kun ER-komisiitoj) inter si iel disdividu la eksterrilatan taskaron, ĉar ja estas en ĉiuj proponoj homoj havantaj taŭgajn spertojn.

9-personaj estraraj teamoj kun Charlotte kiel prezidanto

Propono 1.1.1 (Charlotte prezidanto, 9-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Merkatiko kaj Informado, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliĉa	
ĜS	Tuŝka	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo, Teknologio
VP2	Tomaŝ	Aktivula Trejnado, Kongresoj, Moviĝeblo
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro
E	Klara	Talento, Volontuloj, Eksteraj Rilatoj (parte)
E	Manuela	Universitata A., Rilatoj kun UEA, Genra Egaleco

Propono 1.1.2 (Charlotte prezidanto, 9-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Merkatiko kaj Informado, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliĉa	Rilatoj kun UEA
ĜS	Tuŝka	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo
VP2	Tomaŝ	Kongresoj, Moviĝeblo
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Universitata A., Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro
E	Klara	Talento, Volontuloj, Eksteraj Rilatoj (parte)
E	Charlotte B.	Aktivula Trejnado, Teknologio, Genra Egaleco

Propono 1.1.3 (Charlotte prezidanto, 9-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliĉa	Rilatoj kun UEA
ĜS	Tuŝka	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo, Teknologio
VP2	Tomaŝ	Aktivula Trejnado, Kongresoj
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Universitata A., Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro
E	Manuela	Talento, Volontuloj, Genra Egaleco, Eksteraj Rilatoj (parte)
E	Roĉjo	Merkatiko kaj Informado, Moviĝeblo, Eksteraj Rilatoj (parte)

Propono 1.1.4 (Charlotte prezidanto, 9-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliĉa	Rilatoj kun UEA
ĜS	Tuŝka	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo, Moviĝeblo, Merkatiko kaj Informado
VP2	Tomaŝ	Aktivula Trejnado, Kongresoj
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo,
E	Roĉjo	Landa kaj Faka Agado, Teknologio
E	Klara	Talento, Genra Egaleco, Eksteraj Rilatoj (parte), Juro
E	Manuela	Universitata A., Volontuloj, Adoleska A.

Propono 1.1.5 (Charlotte prezidanto, 9-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Genra Egaleco, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliĉa	Rilatoj kun UEA, Volontuloj
ĜS	Tuŝka	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo
VP2	Roĉjo	Landa kaj Faka Agado, Talento
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Universitata A.
E	Tomaŝ	Kongresoj, Juro
E	Charlotte B.	Aktivula Trejnado, Moviĝeblo
E	Nickson	Merkatiko kaj Informado, Teknologio, Adoleska A.

Propono 1.1.6 (Charlotte prezidanto, 9-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Talento, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliĉa	Rilatoj kun UEA, Volontuloj
ĜS	Tuŝka	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo, Kongresoj
VP2	Roĉjo	Merkatiko kaj Informado, Eksteraj Rilatoj (parte)
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Universitata A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro
E	Charlotte B.	Aktivula Trejnado, Moviĝeblo, Genra Egaleco
E	Nickson	Teknologio, Adoleska A.

8-personaj estraraj teamoj kun Charlotte kiel prezidanto

Propono 1.2.1 (Charlotte prezidanto, 8-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Merkatiko kaj Informado, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliĉa	Rilatoj kun UEA
ĜS	Tuŝka	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo, Teknologio
VP2	Tomaŝ	Aktivula Trejnado, Kongresoj, Moviĝeblo
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Universitata A., Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro
E	Klara	Talento, Volontuloj, Genra Egaleco, Eksteraj Rilatoj (parte)

Propono 1.2.2 (Charlotte prezidanto, 8-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Merkatiko kaj Informado, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliĉa	Rilatoj kun UEA, Volontuloj
ĜS	Tuŝka	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo
VP2	Tomaŝ	Kongresoj, Moviĝeblo, Talento
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Universitata A., Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro
E	Charlotte B.	Aktivula Trejnado, Teknologio, Genra Egaleco

Propono 1.2.3 (Charlotte prezidanto, 8-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Talento, Genra Egaleco, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliça	Rilatoj kun UEA, Volontuloj
ĜS	Tuška	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo, Teknologio
VP2	Tomaš	Aktivula Trejnado, Kongresoj
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Universitata A., Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro
E	Roĉjo	Merkatiko kaj Informado, Moviĝeblo, Eksteraj Rilatoj (parte)

Propono 1.2.4 (Charlotte prezidanto, 8-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Talento, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliça	Volontuloj, Projektoj
ĜS	Tuška	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Roĉjo	Merkatiko kaj Informado, Landa kaj Faka Agado
VP2	Tomaš	Kongresoj, Moviĝeblo, Pasporta Servo, Juro
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Adoleska A.
E	Manuela	Rilatoj kun UEA, Universitata A.
E	Charlotte B.	Aktivula Trejnado, Teknologio, Genra Egaleco

Propono 1.2.5 (Charlotte prezidanto, 8-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Merkatiko kaj Informado, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliĉa	Rilatoj kun UEA, Volontuloj
ĜS	Tuŝka	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Roĉjo	Landa kaj Faka Agado, Juro, ER (parte),
VP2	Carlos	Kongresoj, Moviĝeblo, Talento
E	Karina	Aktivula Trejnado, Universitata A., Adoleska A.
E	Carlos	Projektoj, Teknologio, Pasporta Servo
E	Manuela	Edukado-Scienco-Kulturo, Genra Egaleco

7-personaj estraraj teamoj kun Charlotte kiel prezidanto

Propono 1.3.1 (Charlotte prezidanto, 7-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Merkatiko kaj Informado, Genra Egaleco, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliĉa	Rilatoj kun UEA, Volontuloj
ĜS	Tuŝka	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo, Teknologio, Moviĝeblo
VP2	Tomaŝ	Aktivula Trejnado, Kongresoj, Talento
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Universitata A., Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro

Propono 1.3.2 (Charlotte prezidanto, 7-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Merkatiko kaj Informado, Genra Egaleco, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliça	Rilatoj kun UEA, Volontuloj
ĜS	Tuška	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Carlos	Projektoj, Kongresoj, Moviĝeblo, Pasporta Servo,
VP2	Tomaš	Aktivula Trejnado, Talento
E	Charlotte B.	Edukado-Scienco-Kulturo, Universitata A., Adoleska A., Teknologio
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro

Propono 1.3.3 (Charlotte prezidanto, 7-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Merkatiko kaj Informado, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliça	Rilatoj kun UEA, Volontuloj
ĜS	Tuška	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Carlos	Projektoj, Kongresoj, Pasporta Servo, Moviĝeblo, Teknologio
VP2	Roĉjo	Landa kaj Faka Agado, Aktivula Trejnado
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Universitata A., Adoleska A.
E	Klara	Genra Egaleco, Talento, Juro

Propono 1.3.4 (Charlotte prezidanto, 7-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Talento, Juro, Eksteraj Rilatoj (parte)
K	Feliĉa	Rilatoj kun UEA, Volontuloj
ĜS	Tuŝka	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Roĉjo	Landa kaj Faka Agado, Merkatiko kaj Informado, ER (parte)
VP2	Carlos	Kongresoj, Moviĝeblo, Pasporta Servo, Projektoj, Teknologio
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Universitata A., Adoleska A.
E	Manuela	Aktivula Trejnado, Genra Egaleco

Propono 1.3.5 (Charlotte prezidanto, 7-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Charlotte S. L.	Merkatiko kaj Informado, Genra Egaleco, ER (parte)
K	Feliĉa	Rilatoj kun UEA, Volontuloj
ĜS	Tuŝka	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Roĉjo	Landa kaj Faka Agado, Juro, Eksteraj Rilatoj (parte)
VP2	Tomaŝ	Aktivula Trejnado, Talento
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Universitata A., Adoleska A.
E	Carlos	Projektoj, Kongresoj, Moviĝeblo, Teknologio, Pasporta Servo

9-personaj estraraj teamoj kun Carlos kiel prezidanto

Propono 2.1.1 (Carlos prezidanto, 9-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo
K	Feliĉa	
ĜS	Roĉjo	Merkatiko kaj Informado, Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Manuela	Universitata A., Rilatoj kun UEA, Genra Egaleco
VP2	Tomaŝ	Kongresoj, Moviĝeblo
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro
E	Klara	Talento, Volontuloj, Eksteraj Rilatoj (parte)
E	Charlotte B.	Aktivula Trejnado, Teknologio

Propono 2.1.2 (Carlos prezidanto, 9-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo
K	Feliĉa	
ĜS	Roĉjo	Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Manuela	Universitata A., Rilatoj kun UEA, Genra Egaleco
VP2	Tomaŝ	Aktivula Trejnado, Kongresoj, Moviĝeblo
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro
E	Klara	Talento, Volontuloj, Eksteraj Rilatoj (parte)
E	Nickson	Merkatiko kaj Informado, Teknologio

8-personaj estraraj teamoj kun Carlos kiel prezidanto

Propono 2.2.1 (Carlos prezidanto, 8-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo
K	Feliĉa	Volontuloj
ĜS	Roĉjo	Merkatiko kaj Informado, Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Manuela	Universitata A., Rilatoj kun UEA, Genra Egaleco
VP2	Tomaŝ	Kongresoj, Moviĝeblo, Talento
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro
E	Charlotte B.	Aktivula Trejnado, Teknologio

Propono 2.2.2 (Carlos prezidanto, 8-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo, Teknologio
K	Feliĉa	
ĜS	Roĉjo	Merkatiko kaj Informado, Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Manuela	Universitata A., Rilatoj kun UEA, Genra Egaleco
VP2	Tomaŝ	Aktivula Trejnado, Kongresoj, Moviĝeblo
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro
E	Klara	Talento, Volontuloj, Eksteraj Rilatoj (parte)

Propono 2.2.3 (Carlos prezidanto, 8-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo
K	Feliĉa	
ĜS	Roĉjo	Merkatiko kaj Informado, Landa kaj Faka Agado
VP1	Manuela	Universitata A., Rilatoj kun UEA, Genra Egaleco
VP2	Tomaŝ	Aktivula Trejnado, Kongresoj, Moviĝeblo
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Adoleska A.
E	Klara	Talento, Volontuloj, Eksteraj Rilatoj (parte)
E	Nickson	Juro, Teknologio

7-personaj estraraj teamoj kun Carlos kiel prezidanto

Propono 2.3.1 (Carlos prezidanto, 7-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo, Teknologio
K	Feliĉa	Volontuloj
ĜS	Roĉjo	Merkatiko kaj Informado, Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Manuela	Universitata A., Rilatoj kun UEA, Genra Egaleco
VP2	Tomaŝ	Kongresoj, Moviĝeblo, Talento, Aktivula Trejnado
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro

Propono 2.3.2 (Carlos prezidanto, 7-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo, Teknologio
K	Feliĉa	Volontuloj
ĜS	Roĉjo	Merkatiko kaj Informado, Talento, Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Manuela	Universitata A., Rilatoj kun UEA, Genra Egaleco
VP2	Tomaŝ	Aktivula Trejnado, Kongresoj, Moviĝeblo
E	Charlotte B.	Edukado-Scienco-Kulturo, Adoleska A.
E	Robert	Landa kaj Faka Agado, Juro

Propono 2.3.3 (Carlos prezidanto, 7-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo, Teknologio, Juro
K	Feliĉa	Volontuloj
ĜS	Roĉjo	Landa kaj Faka Agado, Talento, Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Manuela	Universitata A., Rilatoj kun UEA, Genra Egaleco
VP2	Tomaŝ	Aktivula Trejnado, Kongresoj, Moviĝeblo
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Adoleska A.
E	Nickson	Merkatiko kaj Informado, Teknologio

Propono 2.3.4 (Carlos prezidanto, 7-kapa estraro)

Pos.	Nomo	Propono pri estraraj fakoj
P	Carlos	Projektoj, Pasporta Servo, Teknologio, Juro
K	Feliĉa	Volontuloj
ĜS	Roĉjo	Landa kaj Faka Agado, Eksteraj Rilatoj (parte)
VP1	Manuela	Universitata A., Rilatoj kun UEA, Genra Egaleco
VP2	Tomaŝ	Aktivula Trejnado, Kongresoj, Moviĝeblo
E	Karina	Edukado-Scienco-Kulturo, Adoleska A.
E	Klara	Talento, Merkatiko kaj Informado, Teknologio

V. Resumo kaj fina konkludo

Se vi alvenis al ĉi tiu punkto efektive konatiĝinte kun la kandidatiĝoj per niaj resumoj, vi sendube jam scias, ke antaŭ la Komitato de TEJO ne estas facila elekto. Ni havas kandidatojn ne nur multajn kaj diversajn, sed ankaŭ vere bonkvalitajn - kun apartaj spertoj kaj kompetentoj. El ĉi tiu listo nemalfacile oni povas krei plurajn kombinojn pri kiuj oni dirus, ke fakte estas tute bona estraro. Ne ĉiuj el ili povas elektiĝi - kelkaj restos ekster la estraro. Ni tamen forte esperas, ke ĉiuj el la kandidatoj - sendepende de voĉdonrezulto - trovos por si mem taŭgan lokon en la organizo.

Ni rekomendis 12 el 13 alvenintaj kandidatiĝoj kaj ni konscias, ke tiom superas lokojn en la estraro. Ĉar la kandidatoj vere bonas kaj por ke tiuj lokoj tiukaze laŭeble multu, ni rekomendas elekti estraron konsistantan el 9 personoj (eventuale 8 kaj eĉ pli eventuale 7, sed nepre ne malpli). Kvankam ni havas po du rekomenditajn kandidatojn por la oficoj de Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario, vi ja devos elekti nur po unu. Havante tiun elekton ni (kaj ankaŭ la plejmulto de la aktivuloj kun kiuj ni interparolis) opinias, ke aktuale la plej bona elekto estas Charlotte, Feliĉa kaj Tuŝka kiel la kerno de la teamo. Pri precizan rekomendon ni tamen ne vere povas facile doni, ĉar simple estas pliaj vere bonaj ebloj. Evidente, el ĉiu supra rekomendo venas la konkludo, ke niaopnie la plej elektindaj teamproponoj estas tiuj de 1.1.1 ĝis 1.1.6. Tamen tio ja ne signifas, ke aliaj kombinoj estas malbonaj. Kredeble kun ĉiuj kombinoj prezentitaj en la raporto, TEJO povos esti certa, ke ĝi havos sufiĉe bonan estraron dum la venonta mandato.

Restas al ni nur deziri al la Komitato saĝecon kaj samtempe aktivan, konstrue vigan kaj pacaman engaĝiĝon en ĉi tiu periodo, kiu komenciĝas per publikigo de ĉi tiu raporto kaj finiĝas per la voĉdonoj. Bonvolu memori, ke TEJO estas organizo en kiu ni devas kunlabori por nia komuna celaro. Foje tentas nin trakti tian organizon, la Komitaton, la elektojn, iom kiel politikan sabloludejon, sed - laŭ ni - ĝi ne estu tio. La estraro ekzistas por kunlabori kaj por kunlaborigi. Tial gravas elekti ne nepre tiujn, kiuj plej bone pikos siajn balotkonkurantojn, sed tiujn, kiuj kapablos plej bone ion kunkrei. Provu kribri la grandan bruon kreita de provokado disde la milda garantio de bonkvalita laboro pruvita per agoj. La elekto certe ne estos facila, sed ni esperas, ke vi faros ĝin tiel, ke vi ne havu zorgojn pri la estraro dum la sekva jaro, precipe meze de la tutmonda pandemio.

Sukcesan voĉdonon al la komitato, kaj sukcesan kunlaboradon al ĉiuj aktivuloj, kiuj pretis kandidatiĝi en ĉi tiu elektado, sendepende de la rezulto.

La Elekta Komisiono:

Hans Becklin, Oleksandra "Sasha Murr" Kovyazina, Francesco Maurelli, Ana Ribeiro, Łukasz Żebrowski

Aldono: dokumentoj liveritaj de la kandidatoj

Vivresumoj kaj motivigaj leteroj

MOTIVLETERO de BUI HAI MUNG

Karaj kaj Estimataj,

Mi nomiĝas Mung Bui (Feliĉa), esperantistino el Vjetnamio. Ĉi jare mi estas 28 jara, kaj estas financa kontrolisto. Hodiaŭ, mi skribas al vi por prezenti mian kandidatiĝon al la posteno de la Kasisto de TEJO.

Mi esperantiĝis en 2011, tiam mi estis studentino. En 2012, mi partoprenis en la 97a UK kaj la 68a IJK en Hanojo kiel helpantino. La tempo, kiam mi partoprenis en la du kongresoj donis al mi multajn belajn memoraĵojn, spertojn en Esperantujo kaj motivigas min daŭre aktivigi en Esperanto movado ĝis nun.

De 2015 mi estas ĝenerala sekretario kaj kasistino de Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO), respondecas pri organizado de E-eventoj kaj kiel kasistino mi zorgas pri financo de VEJO, preparas la buĝeton por ĉiuj agadoj de VEJO kaj faras ĉiujaran raporton pri financo de VEJO.

Mi ankaŭ estas kasisto de TEJO de 8/2017 ĝis nun. Post 3 jaroj mi jam havas sperton pri agadoj kaj financoj de TEJO, librotenado de UEA kaj nova librotenado sistemo de TEJO. Mi volas daŭrigi mian postenon por la venonta mandato por zorgi financon de TEJO. Mi estas faka kaj havas sperton pri TEJO agadoj, mi kredas ke tio tre helpas por la posteno kasisto.

Laste, mi daŭre volas labori por TEJO kaj Esperanto kaj diligente laboros per mia tuta kapablo. Mi kredas ke mi povos esti taŭga kasisto de TEJO. Mi multe dankas vin pro, ke vi ŝparu tempon legi mian leteron kaj mi deziras sukceson al la nova teamo.

Amike

Mung Bui

VIVRESUMO

1. PERSONAJ INFORMOJ

Bui	Hai Mung (Felicha)
<i>Familia nomo</i>	<i>Antaŭnomo</i>

2. VIVRESUMO/EDUKO/LABORO

Lernejoj depost la bazlernejo		
Lernejo/universitato (<i>nomo</i>)	grado (liceo, gimnazio, altlernejo ktp.)	Ricevita titolo
Le Quy Don	Altlernejo	Elstara/Distingita diplomo
Nacia Ekonomia Universitato	Universitato	Elstara/Distingita diplomo

Pagata(j) laboro(j)		
Dunganto	Periodo	titolo, funkcio
KTV Aŭditora Limigita Kompanio	12/2013 – ĝis nun	Financa kontrolisto

Laboro en asocioj, fondaĵoj, kiel volontulo...		
Organizaĵo	periodo	Taskoj
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo	7/2017 ĝis nun	Kasisto - Kontroli financon de TEJO, prepari la buĝeton por ĉiuj agadoj de TEJO - Fari ĉiujaran raporton pri financo de TEJO - Kontroli kaj aprobi kostojn de TEJO - Aliaj agadoj en TEJO estraro
Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO)	07/2012 ĝis nun	Ĝenerala sekretario kaj kasistino de VEJO - Kontroli financon de VEJO, prepari la buĝeton por ĉiuj agadoj de VEJO - Fari ĉiujaran raporton pri financo de VEJO - Kunlabori kun aliaj vjetnamaj junuloj por okazigi aranĝojn: + Somera Renkontiĝo de VEJO ĉiu jare + Komuna Seminario (Eo-aranĝo inter 4 landoj: Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Vjetnamio) - KS + Azia kongreso (AK) + Kunveno de Sudorienta Azia Junularo (Kuŝejo) - Helpi organizi kaj prepari eventojn de Vjetnama Esperanto-Asocio kiel Printempa Renkontiĝo (en Marto), Tago de Lingva Justeco (18/07) Zamenhof-Tago (15/12), - Helpanto de la 68a IJK kaj 97a UK en Hanojo en 2012.
Universala Esperanto-Asocio (UEA)	07/2017	Helpanto de UEA en la 102 UK en Koreio

3. RESUMO DE AGADO EN ESPERANTO-MOVADO

Periodo	Roloj	Priskriboj
11/2011		Esperantistiĝis en Vjetnamio, kaj membriĝis en VEJO, VEA, UEA
7/2012 – 8/2012	Helpanto dum UK 97a kaj IJK 68a en 2012	- Respondecis solvi demandojn de kongresanoj pri kunvensalonoj, manĝejoj, ktp - Gvidis ekskursojn
06/2013 – ĝis nun	Kunorganizanto de SOREN (Somera Renkontiĝo) en Vjetnamio	- Aranĝas programeron - Kontrolas financon
28/12-30/12/2014	Kunorganizanto de la 33a Komuna Seminario (KS) en Hoĉiminh urbo, Vjetnamio.	- Respondecis pri programo - Gvidis ekskursojn - Kontrolis financon
10/2015 – ĝis nun	Ĝenerala sekretario kaj kasistino de VEJO	- Decidas gravajn decidojn de VEJO - Kontrolas financon de VEJO, preparas la buĝeton por ĉiuj agadoj de VEJO
08/2016	Helpinstruisto de kursoj de Esperanto.	- Bovenigis sinjoron Augusto Casquero al Vjetnamio - Aranĝis loĝejon, E-kursojn - Estis helpinstruisto de la E-kursoj
07/2017	Helpanto de UEA en la 102 UK en Seulo	Hepilis pri la filmadoj de ĉiuj IKU/AIS prelegoj, solena malfermo/fermo kaj eventuale de la futbalmatĉo, koncerto...
04/2018	Kunorganizanto de la 1a Sudorienta Azia Renkontiĝo en 2018 en Tajlando	- Respondecis pri programo - Faris buĝeton - Informando
07/2017- Ĝis nun	Kasisto de TEJO	- Kontrolas financon de TEJO, preparas buĝeton - Faras financon raporton - Kontrolas kaj aprobas kostojn de TEJO - Aliaj agadoj en TEJO estraro
04/2019	Kunorganizas Azian Kongreson (AK) en Vjetnamio	Respondecis pri ekskursoj en la kongreso
05/2019	Kunorganizas Komunan Seminarion (KS) de Azia junularo en Vjetnamio	- Respondecis pri programo, loĝejo - Gvidis ekskursojn - Zorgis financon

Lingvo	parolata <i>kapablo de A2 (tre baza) ĝis C2 (flua)</i>	skribata <i>kapablo de A2 (tre baza) ĝis C2 (flua)</i>	Lega <i>kapablo de A2 (tre baza) ĝis C2 (flua)</i>
Vjetnama	Denaska	Denaska	denaska
Angla	B2	B2	B2
Esperanto	C1	C1	C1

5. REFERENCOJ

- a. S-ino **Nguyen Thi Nep** – Prezidanto de VEJO (Vjetnama Esperantista Junulara Organizo)
Retadreso: ejung.hanoi@gmail.com.
- b. S-ino **Nguyen Thi Phuong Mai** – Ĝenerala Sekretario de VEA (Vjetnama Esperanto-Asocio)
Retadreso : goldenprocom@gmail.com.

Estimataj,

Responde al la alvoko publikigita en la retpaĝo de TEJO, mi anoncas per tiu ĉi letero mian kandidatiĝon al la Estraro de TEJO por 2020/2021.

Mi devenas de Rumanio kaj eklernis Esperanton rete, per *lernu!* Mi iĝis membro de TEJO/UEA en 2015. Tiam mi estis studanta Interkulturan Mediacion kaj mi decidis verki mian magistran esploron pri Esperanto. Je ĝia fino, mi malkovris ke mi ŝatas la komunumon kaj mi decidis engaĝiĝi pli pere de volontulado, ĉe Esperanto-Kultur-Centro en Tuluzo (Francio), ĉe TEJO en Roterdamo (Nederlando) kaj ĉe la interreta plurlingva retejo Tutmondaj Voĉoj. Dum studaj interŝanĝoj, mi ankaŭ vojaĝis al Brazilo, kie mi aktivis en Esperantaj asocioj (Rio-de-Ĵaneiro kaj San-Paŭlo). Nuntempe mi doktoriĝas pri Antropologio en la Universitato de St Andrews, kie mi estas ankaŭ aktiva membro de la Esperanto-Asocio de Skotlando.

Esperanto, kaj ĉefe volontulado per ĝi, ebligis al mi konatiĝon kun junulara agado, sed ankaŭ kun intergeneracia komunikado. Dum jaroj de partoprenado en Esperantaj strukturoj, mi lernis preni iniciaton, krei projektojn kaj adaptiĝi al diverskulturaj labormanieroj. Kunlaboran projekton pri Genra Egaleco de TEJO kaj Tutmondaj Voĉoj mi partoprenas ekde pasintjare, kunigante fortojn por tradukado de artikoloj pritemantaj genron. Mi aparte ĝojas ke la skipo de Tutmondaj Voĉoj ricevadis pli da inaj homfortoj, male al la situacio kiun mi trovis je mia aliĝo, kiam mi estis la nura aktiva ina kunlaboranto. La skipo inkluzivas nun pli da junuloj, sed ankaŭ pli da spertaj provlegantoj, kaj ĝia agado iĝas pli daŭripova.

Miajn kapablojn pri kunlaborado kaj komunikado mi intencas utiligi kiel estrarano de TEJO. Mi opinias ke indas lerni el la spertoj de aliaj generacioj de esperantistoj, pioniroj pri kiuj oni povas legi aŭ samtempuloj kiujn oni povas aŭskulti. Mi bonŝancis, unue, renkonti tiajn pasintajn TEJO-aktivulojn dum miaj volontuladoj, kaj due, povi fokusiĝi pri la agado de antaŭuloj dum esperantologiaj esploroj. Por TEJO-anoj, tiaj spertoj povas iĝi alireblaj per filmetoj en sociaj retoj; ĉirilate la freŝdataj epizodaj filmetoj de TEJO estas kuraĝiga ekzemplo.

Dum mia estraraneco, mi ŝatus labori pri la fakoj Genra Egaleco, Universitata Agado, Rilatoj kun UEA kaj Volontuloj. Mi kandidatiĝas por esti Vicprezidanto de TEJO kaj pretas respondi viajn demandojn.

Kunlaboreme,

Manuela Burghilea

St Andrews, la 31-an de majo 2020

Manuela Burghelea



@manuelaburghelea



manuelaburghelea@gmail.com

EDUKADO & TREJNADO

2019 →

Doktoriĝo pri Antropologio ĉe University of Andrews, Skotlando.

2016 – 2018

Magistriĝo pri Lingvoj, literaturoj kaj civilizacioj (germana-portugala) ĉe Université de Toulouse, Francio. Unujara interŝanĝo ĉe Universidade de São Paulo, Brazilo.

2014 – 2016

Magistriĝo per internacia programo Erasmus Mundus pri Interkultura Mediaco ĉe Université de Lille, Francio, Katholieke Universiteit Leuven, Belgio, Universidade Federal do Rio de Janeiro, Brazilo.

2011 – 2014

Bakalaŭro pri Filologio (franca – germana) ĉe Universitatea București, Rumanio.

2007 – 2011

Mezlernejaj studoj pri Filologio (angla, franca, hispana) ĉe Liceul Ștefan Procopiu, Vaslui, Rumanio.

VOLONTULADO,
AKTIVADO, INTERESOJ

2019 →

Aktivado en la Esperanto-Asocio de Skotlando, per organizado de gastprelegoj (tri en St Andrews kaj du retaj), prelegado dum la jara skota kongreso, partoprenado en la kunvenoj de la asocio.

2016 →

Volontulado kiel tradukanto por la rumanlingva sekcio de Tutmondaj Voĉoj, plurlingva retejo kaj komunumo kiu havas la mision kolekti rakontojn de marĝenigitaj kaj subrepresentitaj komunumoj, pri temoj kiel indiĝena aktivismo, genro, homaj rajtoj, interalie. Ekde 2018, mi ankaŭ volontulas en la esperantlingva sekcio de Tutmondaj Voĉoj.

2018 – 2019

Volontulado ĉe Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Roterdamo, Nederlando, kadre de la programo Eŭropaj Solidaraj Korpusoj. Oficeja laboro, partoprenado en Esperanto-eventoj, partoprenado en junularaj eventoj. Pli da detaloj en la jutuba filmeto "La vivo de la TEJO-volontuloj en Roterdamo".

2018

Aktivado en Rencontre's nous!, porromaa asocio de Tuluzo, Francio.

2017 – 2018

Membro de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, Brazilo. Gastigado de ludejo-teumejo en la jara kongreso, prelegado en regionaj kunvenoj, partoprenado en monataj renkontiĝoj.

2016 – 2017

Volontulado pere de franca ŝtata programo Service Civique ĉe Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo, Francio.

- 2016 Duonjara volontulado ĉe EPIS Association (Éducation populaire pour l'intégration des Roms en France), Lilo, Francio. Partoprenado en alfabetigaj kursoj, kreado kaj traduko de porinfana libreto, perado inter francaj volontuloj kaj rumanparolantaj romaoj.
- 2016 Dusemajna volontulado ĉe Edukácia@Internet, Nitro, Slovakio, por Universala Kongreso, kadre de la projekto Dobrovoľníctvom za svetové Slovensko (*Volunteers in the swirl of international Slovakia*).
- 2015 Membro de Mitrajectoires, studenta asocio por la plibonigo de vivkondiĉoj por migrantoj.
- 2013 - 2014 Privata instruisto pri la franca kaj la germana, Bukareŝto, Rumanio; asistanto en la biblioteko de Lectorat de français, Universitatea București, Rumanio.

LINGVOKAPABLOJ

Denaska lingvo Rumana

Aliaj lingvoj

	KOMPRENO		PAROLO		SKRIBO
	Aŭda	Lega	Interaga	Produkta	
Franca	C1	C1	C1	C1	C1
Angla	C1	C1	C1	C1	C1
Portugala	C1	C1	C1	C1	C1
Esperanto	C1	C1	C1	C1	C1
Germana	C1	C1	C1	C1	C1
Hispana	C1	C1	B1	B1	B2

Laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro.



Associação Paulista de Esperanto

Rua Faustolo, 124 - CEP: 05041-000
São Paulo/SP - Telefone: (11) 3862-1183
www.easp.org.br | contato@easp.org.br

ATESTADO

Atestamos que Manuela Burghilea, de descendência romena, foi membro ativo da Associação Paulista de Esperanto (EASP) entre junho de 2017 a maio de 2018.

Neste período, destacamos a atuação dela nas seguintes atividades culturais:

- Palestra sobre a Romênia no 11º Congresso Paulista de Esperanto, ocorrido em São Paulo entre os dias 12 e 15 de outubro de 2017;
- Organizadora do espaço lúdico-recreativo "Gofujo" durante o 11º Congresso Paulista de Esperanto;
- Entrevista para o programa "Viva Gazeto" durante o 11º Congresso Paulista de Esperanto;
- Palestra sobre "Línguas construídas" na Reunião Cultural de janeiro, na sede da EASP;
- Artigo sobre "Línguas construídas" na edição de fevereiro do órgão da EASP, *La Lampiro*;
- Visita ao Centro Educacional da Legião da Boa Vontade (LBV), em São Paulo, para participar como convidada especial da Oficina de Esperanto, anualmente organizada pela LBV e EASP;
- Tradução de legendas para o vídeo "The Looking Planet", apresentado na Reunião Cultural de agosto, na sede da EASP;
- Participação, como palestrante, no Congresso Brasileiro de Esperanto, ocorrido em Curitiba/Paraná, entre os dias 31 de maio e 03 de junho de 2018.

Em nome da diretoria da EASP, agradece pela valiosa contribuição da associada que tão pouco tempo passou entre nós, mas que deixou um exemplo de colaboração que perdurará por longo tempo,

José Roberto Tenório
Diretor financeiro
financo@easp.org.br
<http://easp.org.br>



ESPERANTO

– INTERNACIA LINGVO –

KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ

-KKE-

ATESTILO

KKE donas ĉi tiun atestilon al la
Magistrino pri Interkultura Mediaco

MANUELA BURGHELEA

pro sia partopreno, kiel prelegantino, en nia Projekto
“FENESTRO POR LA MONDO”, pri la Temo: “DEFIOJ DE LA
INTERNACIA KOMUNIKADO KAJ LA ROLO DE LA
PLANLINGVOJ”


Helder Vieira Lopes
PREZIDANTO




Desiderio Pires Silveira
VICPREZIDANTO

Rio de Janeiro, la 16an de Majo, 2018

Madame **Manuela Burghilea**, née le 27/05/1992 a effectué une mission de Service Civique de 8 mois du 01/09/2016 au 30/04/2017 au sein du Centre Culturel Espéranto.

La mission confiée à Madame Burghilea a été la suivante :

« **Faire connaître la langue internationale espéranto, sa culture, ses valeurs** ».

Dans ce cadre, elle a réalisé les tâches suivantes :

- Réalisation de l'émission de radio hebdomadaire (Conception en commun du programme, utilisation de logiciel de montage audio (Audacity), matériel d'enregistrement, recherche d'informations puis rédaction ainsi que lectures de chroniques enregistrées ou en direct, animation, prise de contact avec des invités, réalisations interviews lors de stands, rencontres ou en direct)
- Participation à l'organisation de divers événements : Krokodila renkontiĝo, Semaine de l'espéranto (organisation de réunions, accueil, séances d'affichage...etc...)
- Organisation d'une rencontre skype avec des brésiliens, accueil d'espérantophones étrangers
- Création d'affiches, utilisation de logiciels graphiques
- Rencontres avec associations partenaires, participation à des réunions, rédaction de compte-rendus
- Présentations dans le cadre de rencontres des possibilités de volontariat grâce à l'espéranto.
- Participation à plusieurs stands d'information, animations ludiques, ateliers de découverte
- Participation à des réunions de réflexion et d'échange sur la communication
- Tâches de communication diverses telles que : animation des réseaux sociaux, mise à jour du site internet, rédaction d'articles, prise de photos...
- Mise en place d'un partenariat avec le printemps étudiant
- Réalisation du bulletin annuel (mise en page, rédaction, recueil de témoignages) et envoi en nombre
- Participation aux Assemblées Générales de l'association
- Participation à une rencontre internationale (Figueres, Catalogne), à un stage en Ariège
- Formation civique et citoyenne sur l'antigasillage alimentaire et la formation PSC I
- Traduction de documents (français/espéranto)

Les principales compétences dont elle a fait preuve dans le cadre de son engagement sont:

Savoir être

Sens du service
Sens relationnel et de l'accueil
Travail en équipe
Autonomie
Créativité

Connaissances

Dans le domaine de la communication
Dans le domaine de l'animation
Pour la gestion de projet
Connaissances bureautiques

Utilisation de plusieurs langues (écrit/oral) pendant la mission.

Appréciation globale du tuteur/recommandation :

Très bonne appréciation du travail et de l'état d'esprit de Manuela pendant ces 8 mois de volontariat. Elle a fait preuve d'autonomie, d'un grand sens relationnel, s'est très bien intégrée dans l'association, a été force de proposition. Elle a participé à renforcer la dynamique collective au sein de l'équipe des bénévoles, a su développer et mettre ses compétences au service de sa mission dans des domaines très variés.

Toulouse, le 02/05/2017

La volontaire,
Manuela Burghilea :

Manuela Burghilea

La tutrice,
Marion Quenut :

Marion Quenut

Le responsable, **Centre Culturel d'Espéranto**
Daniel Maynaud
31 rue Franc 31000 TOULOUSE
05 61 62 39 48 / 06 31 68 00 26
esperanto.toulouse@free.fr
Daniel Maynaud



Youthpass

EUROPEAN VOLUNTARY SERVICE

Manuela Burghilea

BORN ON **27/05/1992** IN **Vaslui, Romania**

PARTICIPATED AS A VOLUNTEER IN THE PROJECT

Dobrovoľníctvom za svetové Slovensko

IN THE RECEIVING ORGANISATION **Edukácia@Internet**

THE PROJECT TOOK PLACE FROM **20/07/2016**
TO **02/08/2016** IN **Nitra, Slovak Republic**

EUROPEAN VOLUNTARY SERVICE

The aim of European Voluntary Service in Erasmus+ is to develop solidarity and promote active citizenship of young people. During their stay of up to 12 months in the receiving country, young people contribute to social cohesion and considerably enhance their personal, professional and intercultural competences.

European Voluntary Service is normally carried out in partnerships between young volunteers, organisations in their country of residence and organisations in a receiving country.

Erasmus+ is the European Union's programme for boosting skills and employability through activities organised in the field of education, training, youth, and sport. Youth activities under Erasmus+ aim to improve the key competences, skills and employability of young people, promote young people's active participation in the society, their social inclusion and well-being, and foster improvements in youth work and youth policy at local, national and international level.



www.ikso.net

Vitazná 840/67 A
SK-958 04 Partizánske
Slovakia

Peter Baláž

Representative of the organisation

**Youthpass**

With this document we certify that **Manuela Burghelea** spent her European Voluntary Service in the project **Dobrovoľníctvom za svetové Slovensko** in **Nitra, Slovak Republic** with the organisation **Edukácia@Internet**.

www.ikso.net

Vitazná 840/67 A
SK-958 04 Partizánske
Slovakia

Peter Baláž

Person in charge of the project

Nitra, 18/10/2016

INSTITUT FRANÇAIS D'ESPERANTO

L'Institut Français d'Espéranto,
organisme commun des Associations
Espérantistes Françaises,
certifie que

La Franca Esperanto-Instituto,
ekzamen-ofico de la Interasocia Franca
Komitato,
certigas, ke

M^{me} Manuela BURGHELEA

ayant subi avec succès les épreuves
réglementaires, a reçu le diplôme
**CERTIFICAT D'ETUDES
PRATIQUES**

et possède une connaissance élargie de la
langue internationale Espéranto.

Délivré à Paris, le 4 juillet 2016

Le président de l'Institut

Vincent Van Praet

sukcese plenuminte la regulajn provojn,
ricevis la diplomon de
**ATESTO PRI PRAKTIKA
LERNADO**

kaj posedas plilarĝigitan konon de la
internacia lingvo Esperanto.

Aljuĝita en Parizo, la 4^a de julio 2016


La prezidanto de la Instituto

Certificate


Burghelea Manuela

TOOK PART IN THE INTERNATIONAL EXPERT SEMINAR "YOUNG PEOPLE'S ACCESS TO RIGHTS: LEARNING AND SHARING EXPERIENCES IN YOUTH POLICY AND YOUTH WORK", WHICH WAS HELD FROM 25 TO 28 NOVEMBER 2018 IN MOSCOW, RUSSIAN FEDERATION, WITHIN THE ACTION PLAN OF THE FRAMEWORK PROGRAMME ON COOPERATION BETWEEN THE COUNCIL OF EUROPE AND THE RUSSIAN FEDERATION IN THE FIELD OF YOUTH POLICY.

Moscow, 28 November 2018



Grigory Petushkov
Chairman of the National Youth
Council of Russia



Antje Rothemund
Head of the Youth Department
Council of Europe



Ministry of Science and Higher Education
of the Russian Federation



National Youth Council
of Russia



MIREA
Russian Technological University

COUNCIL OF EUROPE



CONSEIL DE L'EUROPE



This is to certify that

Manuela Burghelea

has been a volunteer for the **UN SDG Action Campaign** at the **SDG Global Festival of Action** held at the World Conference Center in Bonn, Germany from 2 to 4 May 2019 and during the preparations on 1 May 2019.

Festival volunteers supported the organizing team with tasks such as registering and welcoming participants, assisting with the session management, answering participants' questions at the information desk, supporting the exhibitions and innovations area, the SDG Studio, the SDG Action Zone, the SDG Action Awards, the Film Festival, the Virtual Reality film screenings and other festival experiences, taking photos and videos, assisting with social media, and helping with general logistics and communications tasks.

We thank you for your support!



Marina Ponti
Director
United Nations SDG Action Campaign

Charlotte BURTON estas 31-jaraĝa virino el Teksaso en Usono. Ŝi eklernis Esperanton dum 2012 kaj jam trapasis la KER-ekzamenon je la C1 nivelo. Charlotte helpis traduki kaj mem-eldonis Esperantan tradukon de la fama verko de H.P. Lovecraft "La Voko de Ĥtulho" ("The Call of Cthulhu") kaj verkis laborlibron "Beginning Esperanto Workbook." Charlotte estis estrarano de Esperanto-USA ekde 2014 ĝis 2019, kaj nun estas sekretario de Esperanto-USA, koresponda sekretario de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE), kaj prezidanto de la Usona Esperantista Junularo (USEJ).

Karaj,

Mi tiom partoprenas nian movadon, ĉar mi tiom kredas je la valoro de la interna ideo. La movado en Usono estas pli kaj pli aktiva, sed eble tio estas malofte videbla internacie. Mi volus kandidatiĝi kiel estrarano de TEJO por venigi pli da komunikado inter la usona movado kaj la internacia movado, por montri nin al vi kaj vin al ni. Mi ankaŭ volus pli aktiviĝi en la internacia movado kaj helpi antaŭenigi nian karan internacian komunumon iel, kaj mi jam konas kaj amas kelkaj el vi. Mi konas vian laboron kaj konsentas fariĝi aktivan parton de la grandaj laboroj de TEJO. Mi volonte transprenus iu(j)n ajn el la jenaj fakoj: Komisionoj (Edukado-Scienco-Kulturo, Aktivula Trejnado), Interesgrupoj (Genra Egaleco, Moviĝeblo, Teknologio)

Amike,
Charlotte BURTON

Estimataj amikoj,

Mi kandidatiĝas por la posteno de ordinara estrarano. Antaŭ kvin jaroj mi ekaktivis en TEJO, kaj de tri jaroj membras en la Komitato. Mi havis tempon sperti kiel funkcias nia organizo, partopreni multajn renkontiĝojn, agadi diversmaniere en nia movado, kaj disvolvi proprajn vidpunktojn kaj ideojn. Tial alvenis por mi la tempo pli profunde kaj gvide kontribui al ĝi. Krome, mi translokiĝos al alia lando septembre, forlasante antaŭajn respondecojn; do povos ekde komence inkluzivi estraran laboron en mian tute novan tempoplanon.

Mia aktivado en TEJO ĉefe fokusiĝis al Eksteraj Rilatoj: mi (kun)reprezentis TEJO en diversaj konferencoj tra la jaroj kaj estas komisiito pri rilatoj kun UNITED. Ekster TEJO mi aktivis en la movado jam junaĝe per prelegoj kaj partopreno al la Verdaj Skoltoj, kaj lastatempe per artikoloj, voĉlegado kaj tradukado. Mi aktivas ankaŭ en aliaj movadoj: de tri jaroj mi volontulas por UNITED, kaj en 2019 membris en ĝia Kampanj-Kunordiga Teameto (CPG). Tiu lasta tasko postulis distancan, ĉefe retan kunlaboron kun malgranda teamo, kaj ni fizike renkontiĝis nur 2-foje. De unu jaro mi aktivas en mia loka grupo de Extinction Rebellion (XR), kie mi organizis, kunordigis kaj varbis prelegojn kaj trejnadon diversloke. Mi nun aktivas en la kunordiga teamo, kiu transdonas informojn, taskojn kaj diskutendaĵojn inter la diversaj laborgrupoj de la movado.

Mi estas fleksebla kaj laborema. Mi ĉiam preferis havi diversajn taskojn kaj ĉiutage dediĉi tempon al pluraj el ili. Tiel mi lernis kiel sendepende organizi mian tempon, prioritigi taskojn depende de cirkonstancoj, kaj ĉie atingi kontentigan rezulton sen troa premo kaj streĉiĝo. Miaj kolegoj – ĉu en mia pagita laboro, ĉu en volontulado – aprezas mian laboremon, komunikemon kaj iniciaton. Post akiri la necesan sperton por koni la farendaĵojn, mi ankaŭ konscias pri tio, kiuj taskoj postulas kunlaboron kaj serĉas por tio la ĝustajn homojn. Ekzemple, antaŭ nelonge la monkolekta teamo de mia nacia XR-movado bezonis datumojn de ĉiu loka grupo pri agadoj, sukcesoj kaj planoj. La kontribuo de Amsterdamo estis tre grava al ili, ĉar ĝi estas la plej granda kaj aktiva branĉo. Tamen, ĉiu estis tre okupita, do mi estis la nura homo kiu reagis al la peto. Finfine mi pasigis multajn horojn por kolekti kaj kunigi ĉiujn necesajn informojn, el retejaj arkivoj kaj kontakto kun diversaj aktivuloj.

Dank' al mia sperto en aliaj movadoj, mi povas alporti novajn perspektivojn al TEJO. Ekzemple, inspirite de la sukcesa labormaniero de XR, mi ŝatus strebi al pli vasta partopreno de junularo en TEJO kaj ĝiaj komisionoj. Mi opinias ke ni povus esti pli malfermaj kaj alireblaj, ol ni nun estas, pli kuraĝe serĉi kaj esplori tute novajn ideojn. Plibonigindas ekzemple strukturita interago kun nia anonima ret-amaso, rapida kunpartigo kaj inspiriĝo inter lokaj agadoj, kaj kreindas malferma forumo kie la tuta E-junularo pridiskutu libere movadajn kaj praktikajn temojn.

Mi specife interesiĝas pri la jenaj fakoj kaj respondecoj.

- ESK, ĉar tio proksimas al miaj vivspertoj.
- Moviĝebloj, ĉar kolerigas min la monda maljusteco en vojaĝebloj, kiu ankaŭ trafas niajn aktivulojn.
- Genra egaleco, ĉar mi tre interesiĝas pri la temo kaj ŝatus kuraĝigi plian partoprenon de malinoj al la interesgrupo, kaj esplori eblojn de novaj trejnadaj.
- Rilatoj kun UEA, ĉar mi rimarkis diversajn intergeneraciajn malkonsentojn, kaj por trakti ilin necesas kompreni perspektivojn unu de la alia kaj koni historion; kreskinte en la movado, mi povas kontribui al bona interkompreniĝo.
- Volontuloj, sed nur se mi ne loĝos tro fore, ĉar laŭ mi gravas fizikaj vizitoj de tempo al tempo. Bedaŭrinde, mi nun ankoraŭ ne scias kien mi translokiĝos.
- Mi pretus helpi pli spertan estraron pri la pezaj fakoj KER aŭ AT. Sperton kun KER mi havas, ne kun AT: sed mi spertas pri organizado kaj gvidado de trejnadaj en la XR-movado, kaj profesie gvidas studentajn laborgrupojn en universitato.

Mi dankas por via atento kaj konsidero, kaj disponeblas por estontaj demandoj kaj diskutoj.
Laboreme kaj amike,

Klára Ertl

Klára Ertl

Vivresumo

Amsterdamo, Nederlando

klara.ertl@gmail.com

Telegramo: @klaraE

Agado en Esperantujo

TEJO

2017 – nun	Komitatano A por Germana Esperanto-Junularo
2016 – nun	Komisiito pri rilatoj kun UNITED
2016 - 2018, planis por 2020	Partopreno Eŭropa Junulara Evento kaj Yo!Fest
2016 – 2019	Partopreno 5 konferencoj de UNITED
2017	Partopreno SDG Global Festival of Action
2015	Partopreno UNESCO Junulara Forumo kaj prepariĝa renkontiĝo de Eŭropaj reprezentantoj

Aliaj

2020	Komencis partopreni tradukadon/provlegadon en Global Voices Finaranĝas eldonon de mia traduko de la poemo "Pasporto" de Antoine Cassar
Sep. 2019 – nun	Voĉlegado por revuo Esperanto
2015 - nun	Verkado de kelkaj artikoloj por Kontakto, Beletra Almanako, estonte Monato
2011 – nun	Prelegado pri diversaj temoj en diversaj aranĝoj
2013 – 2016	Partopreno en Verdaj Skoltoj

Aliaj volontulaj agadoj

Marto 2020 – nun	Membras en Kunordiga Teamo de Extinction Rebellion Amsterdam (XR)
Dec. 2019 – nun	Membras en laborgrupo "Outreach & Training" (varbado kaj trejnado) de XR: kunordigis kaj varbis trejnadojn kaj prelegojn , mem prelegis kaj trejnis
Junio 2019 – nun	Partoprenas agadon, eventojn, protestojn de XR
2017 – nun	Laboras pri la Mortolisto de UNITED (Refugee List of Deaths)
2019	Membris en la Kampanj-Kunordiga Teameto (CPG) de UNITED Gvidis laborgrupojn kaj prezentis agadon rilate al la Mortolisto kaj CPG dum 2 konferencoj de UNITED
2017	Volontulado dum 2 konferencoj de UNITED (preparo kaj malpreparo de ejo, praktika helpo, registriĝo de partoprenantoj, k.s.)
2013 – 2014	Membris aktive en studenta loka branĉo de Amnesty International

Edukado kaj profesiaj spertoj

Aŭg. 2018 – aŭg. 2020	Tutoro por unuajaraj psikologistudentoj en Universitato de Amsterdamo (gvidas du 15-kapajn studentklasojn, teama plibonigado de instrumaterialoj, instruado kaj korektado de akademia verkado)
Dec. 2017 – aŭg. 2018	Akompananto/zorganto de mense kaj fizike handikapitaj plenkreskuloj ĉe Amsta Karaad, Amsterdamo
Okt. 2017 – marto 2018	Trejniĝanto ĉe edukcentro por aŭtismaj infanoj ĉe Raeger Autismecentrum, Amsterdamo
2015-2016	Majstriĝo pri Disvolviĝa Psikologio , Universitato de Maastricht Diskutgvidanto por studentklasoj, Universitato de Maastricht

ĜenSek: nek ĝena nek seka

aŭ: kial mi kandidatiĝas por la estraro de TEJO

Jam longe mi estas aktiva en la Esperanto-movado, ekde 2010, kaj en diversaj okazoj iu demandis min, ĉu mi volus iĝi estrarano de TEJO. Mi kelkfoje sukcesis eviti la demandon per membriĝi en la Elekta Komisiono, kies membroj ne kandidatiĝu, kaj lastfoje per organizado de IJK. Sed nun elĉerpiĝas miaj pretekstoj, la estraro bezonas spertajn aktivulojn, kaj eĉ iuj amikoj de mi samtempe kandidatiĝas.

Mi ĉefe kandidatiĝas por iĝi **Ĝenerala Sekretario**. Mi havas riĉan koncernan sperton: kiel volontulo de TEJO, prezidanto de NEJ, kaj nun sekretario en la miaprovina verda partio-estraro. Ĝi estos mia ĉefa estrara okupiĝo, mi tenos kalendaron kun ĉiuj limdatoj kaj proceduroj, kaj eĉ pli ol nun mi parkere konos ĉiujn aplikeblajn regularojn.

La posteno de Ĝenerala Sekretario estis malstabila en pasintaj jaroj, kaj tio malhelpis TEJO-n en diversaj manieroj. Ĉar la ĜenSek ne nur malfermas voĉdonojn kaj publikigas protokolojn, sed estas ankaŭ la ĉefa kontaktpersono por komitatanoj. Komitatanoj konektas la TEJO-estraron al siaj sekcioj kaj membroj, kaj kiam ili estas bone engaĝitaj, ili povas dividi la ideojn de TEJO kun la tuta mondo. Sed por tio necesas sufiĉe da havebleco, dediĉemo kaj kontaktemo.

Krom la gravega posteno de ĜenSek pro miaj antaŭa sperto, kontaktoj kaj loĝloko mi estos plej taŭga por subteni al **Volontuloj**, kaj eventuale ankaŭ por okupiĝi pri **Rilatoj kun UEA**.

En la okazo, ke estas alia preferata kandidato por Ĝenerala Sekretario, mi kandidatiĝus por **Vicprezidanto**, kaj ĉefe uzus miajn kontaktojn kaj spertojn por trovado de **Talento**. Kaj tiu fako laŭ mi bone kombineblas kun **Informado kaj Varbado**, por ĉiam strebi atingi kaj engaĝi interesiĝantojn, komencantojn, parolantojn, aktivulojn ĝis komisiitoj.

Kiel sendependa tradukisto kun stabila hejma vivo mi ĉiam elektas miajn proprajn horojn kaj preskaŭ ĉiam povas laŭbezone prioritatigi kaj urĝigi TEJO-farendaĵojn. Mi esperas krei ordon en la ĥaosa vivo de TEJO-estraranoj, kaj permesi al ili koncentriĝi pri siaj elektitaj fakoj. Kaj kune kun Carlos mi ŝatus altigi la kvanton da komedio en la estraraj kunvenoj.

Mi estas preta por viaj demandoj!

Rogier 'Roĉjo' Huurman

Rogier 'Roĉjo' Huurman



Utrecht

+31 6 3925 1063

rogier@rogierhuurman.nl

<https://rogierhuurman.nl>



1990-01-26

KAPABLOJ

- ❖ Organizado de eventoj, gvidado de asocioj, konduki kampanjojn, verki, korekti kaj traduki tekstojn, kreo de retpaĝoj, filmmuntado, stelulo kun kalkultabeloj.
- ❖ Javascript, Java, Python, C, Pascal, SQL

LINGVA SCIPOVO LEGA/PAROLA

- | | |
|--------------|-------|
| ❖ Nederlanda | C2/C2 |
| ❖ Esperanto | C2/C2 |
| ❖ Angla | C2/C1 |
| ❖ Germana | C1/B2 |
| ❖ Franca | B2/B2 |
| ❖ Pola | B1/B1 |
| ❖ Dana | B2/A2 |
| ❖ Itala | B1/A2 |
| ❖ Sveda | B1/A1 |
| ❖ Hispana | B1/A1 |

PAGITA LABORO

- ❖ 2017 – nun: Alpaca Tekst & Taal
 - Sendependa traduko de reklamoj, instrukcioj, privatecpolitikoj ktp.
 - Aŭtomatigo de tradukado
- ❖ 2016 – 2017: Technology Management and Network Services B.V.
 - Junior Consultant
 - Klientoj: Liberty Global, ServiceHeroes
- ❖ 2015 – 2016: SecurIT BV
 - Security Support Engineer
 - Klientoj: Ahold
- ❖ 2015 – 2016: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
 - Volontulo en Roterdamo

ESPERANTO-AGADO

- ❖ 2018 – 2020: Ĉeforganizanto IJK 2020
- ❖ 2015 – 2020: Prezidanto/kasisto de NEJ
- ❖ 2012 – 2019: Ĉeforganizanto KKPS
- ❖ 2014-16, 2018-19: Elekta komisiono
- ❖ 2013 – 14: Volontulo de TEJO
- ❖ 2010 – nun: Planado kaj gvidado de multaj trajnkaravanoj
- ❖ 2010 – 2013: Organiza teamo de DEJO en Roskilde-festivalo
- ❖ 2010 – 2013: Organiza teamo de FESTO

POLITIKA AGADO

- ❖ 2018 – nun: GroenLinks (verda partio)
 - Sekretario de GL provinco Utrecht
 - Prezidanto de Laborgrupo pri privateco
- ❖ 2017 – 2018: Memstara organizado de diversaj kampanjetoj
- ❖ 2010 – 2017: Piratenpartij
 - Kandidato por EP 2014 kaj parlamento 2017
 - Komitato 2015 – 2017
 - Kunfondinto kaj sekretario en 2010

EDUKIĜO

- ❖ 2010 – 2013: Københavns Universitet
 - Scienca Magistro pri teoria fiziko
- ❖ 2007 – 2010: University College Utrecht
 - Scienca Bakalaŭro pri Liberaj Artoj kaj Scienco
 - Kun honoro, av. 3,09/4
- ❖ 2001 – 2007: Stedelijk Gymnasium Nijmegen
 - Antaŭuniversitata mezlernejo kun naturscienca profilo
 - Kun laŭdo, 8,1/10

Goma, la 22-an de Majo 2020

Nicolas Kasolene (Nickson)

nicolaskasolene@gmail.com

(+243) 994 685 988

Goma – D.R.Kongo

Estimata Elekta Komisiono,

Mi skribas ĉi-leteron por esprimi mian intereson servi por TEJO kiel estrarano en jenaj fakoj : Aktivula Trejnado, Edukado, Landa & Faka Agado, Universitata Agado, Informado, Teknologio, kaj Volontuloj.

Havinte ardan deziron komuniki kun homoj el diversaj partoj de la mondo, mi malkovris ke esperanto taŭgas por respondi al mia antaŭ-longtempa deziro, tial mi esperantistiĝis en 2014 kaj post unu jaro mi aliĝis al mia landa asocio DKEA kaj ĝia junulara sekcio DKEJO. Mi komencis instrui esperanton al gejunuloj en mia loĝurbo, Goma kie mi aktive kontribuas al la disvastigado de la lingvo ludante grandan rolon en la organizado de diversaj publikaj E-eventoj, kaj nuntempe agadas kiel la sekretario de la loka E-klubo, Goma Esperanto-Klubo, GEK mallonge. Pro studado, mi translokiĝis al Ruando, kie mi varbis por esperanto kaj instruis esperanton al interesitoj en mia universitato.

Post 5 jaroj en la movado, mi trovis oportunon partopreni la 7an Afrikan Kongreson de Esperanto, kie mi ne nur partoprenis multajn agadojn kaj prelegojn pri la Movado internacie, sed ankaŭ intervenis kiel preleganto pri la temo “Kiel startigi, mastrumi kaj disvastigi E-klubon,,. Mi multe lernis pri TEJO kaj ĝia strukturo, kaj gajnis sufiĉajn spertojn kiuj ebligis al mi post la kongreso, organizi sukcesan seminarion por la renoviĝo de la E-movado en mia loĝurbo, kaj tio rezultigis la aliĝon de 15 gejunuloj al TEJO, motivigis aliajn junulojn en la Kontinento plie aktiviĝi, kaj helpis min malfermiĝi al la Movado tutmonde.

Dum la Afrika Kongreso de Esperanto, en Burundo 2019, mi partoprenis la sesiojn pri Aktivula Trejnado kaj konatiĝis kun TEJO aktivuloj, tio vekigis mian intereson servi por TEJO. Dum la sama tutkontinenta kongreso mi trapasis la ILEI-ekzamenojn en la "spertula" ŝtupo, kaj akiris la plej altan noton kun la mencio “Tre bona,,.

Post tiu Kongreso, mi trovis emon vigle servi por esperanto, pro tio mi ekis kontribui kiel verkanto de artikoloj kaj voĉleganto por la revuo Esperanto.

Mi nuntempe servas kiel volontulo ĉe “Solidareca Bonvolo,,, senprofitcela organizo de esperantistoj, kiu promocias ĉefe la edukadon kaj la vivtenadon de nekapablaj, orfaj infanoj kaj tre malriĉaj familioj. Tie, mi helpas fari la tradukon de projektoj en Esperanto, mi respondecas pri la informadiko en la organizo, kaj prizorgas la enkadriĝon de junuloj per la instruado de esperanto kaj organizado de diversaj E-eventoj. Kaj kiel mi antaŭanoncis, de 2018 ĝis nun mi estas la Ĝenerala Sekretario de la loka E-klubo, Goma Esperanto Klubo. Krom tio, mi estas ankaŭ la Ĝenerala Sekretario kaj Raportisto de la organizo “Youth Engaged for Development and Social Progress,,. Kiel komputilisto profesie, mi havas sufiĉajn spertojn en la Informado kaj Teknologio, tial mi oponias ke mi povas kontribui por la celoj de TEJO en tiuj fakoj.

Mi konvinke kredas ke mi vigle povas helpi la organizon iri antaŭen per miaj konoj kaj kunlaborado. Aldone, mi tre rapide lernas kaj rapide adaptiĝas. Labori por TEJO kiel estrarano metos min en mia ŝatata labormedio, ĉar mi ĉiam volegas labori en kunlabora etoso kaj tiel mi strebas por atingi la plej eble altan sukceson.

Mi estas je via dispono por ajna demando aŭ klarigo. Mi antaŭdankas pro via konsidero kaj bondeziras al vi Bonan Laboron.

Elkora Dankon !

Samideane kaj Sincere,

Nicolas Kasolene (Nickson)

VIVRESUMO

I. PERSONAJ INFORMOJ

Nomo : **Nicolas Kasolene Kakule ‘Nickson’**

Naskiĝdato: La 20an de Majo 1992

Nacieco : Demokrata Respubliko Kongo

Loĝloko : Goma (Kongo DR)

Telefono : (+243) 994 685 988, (+250) 789 137 170

Retadreso : nicolaskasolene@gmail.com

Uzantnomo en sociaj retejoj: **Nickson Kasolene**



II. PERSONA PROFILO

Mi estas tre laborema, tre motivita, entuziasma, lernas rapide, energia, kreema, imagema kaj kapablas efike mem-stariĝi dum sendependaj projektoj, kaj ankaŭ kunlabori en teamo-aranĝo. Mi ĉiam strebas atingi la plej eble altan nivelon, en iu donita tasko kaj en iu ajn situacio.

III. EDUKADO KAJ TREJNADO

EDUKADO	
Sep 2016 – Dec 2019	Bakalaŭro (Komputila Scienco)
	Université Libre de Kigali / ULK, Gisenyi / Distrikto Rubavu – Ruando
Sep 2006 – Jul 2011	Ŝtata Mezgrad-Lerneja Diplomo (Pedagogio)
	MABUNGO Mezgrada Lernejo, Kiwanja / Distrikto Rutshuru – Kongo DR

IV. KOMPETENCOJ

- **Komputil-lertecoj:**
 - ✓ Komputila programado kaj retsistemo, tiel pri bontenado kiel komenca aranĝo;
 - ✓ Sufiĉaj konoj en la mastrumado de la datumbazoj kaj retejoj;
 - ✓ Sufiĉaj spertoj en la fota traktado(editado) kaj video muntado;
- **Komunika lertecoj :**
 - ✓ Bonegaj komunikaj kaj servaj kapabloj, kapablaj konstrui rilatojn kaj establi ligojn;
 - ✓ Bona komprenemo de la aliaj ;
 - ✓ Atentema en malgrandaj detaloj kaj bonega kritika pensado, decidiĝo.

V. ESPERANTO-AGADOJ

Okt 2019 – Nun	Volontulo (Informadika Administranto kaj Projekto-Tradukisto)
	Solidareca Bonvolo (SBV), senprofitcela asocio, Goma – D.R.Kongo
Jun 2019 – Nun	Estrarano (Sekretario kaj Raportisto)
	Raportas ĉion pri la klubo kaj kreas rilaton kun eksteraj instancoj por Goma Esperanto Klubo (GEK), Goma – D.R.Kongo
Maj 2015 – Nun	Instruado de Esperanto en (D.R.Kongo kaj Ruando)
	En la urbo Goma – D.R.Kongo kaj ĉe la Universitato en Rubavu – Ruando
Nov 2019 – Nun	Kontribuanto kaj Tradukisto (MemLingo)
	Projekto pri Esperanta Lernplatformo “Memlingo”, dumlaborata projekto.
MEMBRECOJ	
2020	UEA, TEJO, ILEI, DKEA (Demokrata Kongo Esperanto Asocio), DKEJO (Demokrata Kongo Esperanto Junulara Organizo) kaj GEK (Goma Esperanto Klubo).

VI. SCIPOVO DE LINGVOJ

Lingvo	Parola-Nivelo	Skriba-Nivelo	Aŭskult-nivelo	Lega-Nivelo
Esperanto	C1	C1	C1	C1
Franca	C1	C1	C1	C1
Angla	C1	C1	C1	C1
Svahilo	Denaska	Denaska	Denaska	Denaska
Hispana	A1	A2	B1	B2

VII. REFERENCOJ

Nomo	Kontakto	Respondecoj
Alphonse Waseka	alphonsewaseka@yahoo.fr (+243) 990 428 340	Ĝenerala Direktoro de la Asocio Solidareca Bonvolo (SBV) – Goma / D.R.Kongo
Koffitche Koufianou	koffitch1990@gmail.com (+228) 98 98 91 38	TEJO – Estrarano
Rakoen Maertens	mail@rakoen.be (+44) 73 40 05 99 77	TEJO – Komisiito pri Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko

VIII. HOBIOJ KAJ INTERESOJ

- La legado de entreprenadaj kaj gvidaj libroj kaj revuoj estas mia ŝatokupo;
- Mi ĝuas legadon de teknologiaj magazinoj kaj Esperantaj legaĵoj;

NICOLAS KASOLENE KAKULE ‘NICKSON’

Motiviĝletero de Robert Nielsen

Saluton,

Mi verkas ĉi tiun artikolon por anonci mian kandidatigon al la estraro de TEJO, kiel estrarano respondeca por Landa kaj Faka Agado. Mi opinias ke landa agado estas tiel grava kaj la rilatoj inter la landaj sekcioj kaj TEJO estas tiel malfortaj, ke necesas havi unu estraron kiu respondecas nur pri tiu unu fako. Ĉar pasintaj estraroj dividis la respondecon inter kelkaj estraranoj, neniu respondecis pri la fako kaj pro tio ĝi ŝrumpis. La landaj sekcioj estas la fundamento de TEJO sed dum la pasintaj jaroj kontakto inter ili kaj TEJO velkis. La komisiono pri landa agado estas malaktiva, KODEJO ne aperis ekde 2016, TEJO apenaŭ scias kiel statas la landaj sekcioj kaj ili ne scias kion faras TEJO. Multaj sekcioj ekdormis antaŭ multaj jaroj kaj nun nur ekzistas surpapere. Niaj membroj en landoj sen sekcioj estas forgesitaj.

Tial mi opinias ke TEJO devas havi unu estraron kiu respondecas nur pri Landa Agado kaj nenio alia ĉar multege da laboro estas bezonata. Ni devas rekonstrui kaj fortigi la rilatojn inter la nacia kaj internacia, ni devas helpi kreskigi la malfortajn sekciojn, ni devas subteni esperantistojn en landoj sen sekcioj krei novajn grupojn kaj ni devas forĵeti la ne aktivajn sekciojn kiuj nur estas balastoj. Ni bezonas landajn sekciojn kiuj vere aktivas, tiuj kiuj ekzistas nur papere sed faras nenion ne utilas al ni.

La cirkulero estas bonega sistemo per kiu komitatanoj povas raporti pri sia agado ĉiumonate, mi opinias ke indas krei similan sistemon per kiu unu reprezento de ĉiu landa sekcio raportas pri la agado de la sekcio (ĝis nun, komitatanoj raportas pri sia persona agado, sed indas scii pri la aktivado de la sekcio). KODEJO devas aperi ĉiujare ĉar ĝi estas la plej bona informilo pri la situacioj de la landaj sekcioj.

La komisiono por landa agado havas la eblecon esti tre utila ilo por kunigi aktivulojn kaj diskonigi siajn spertojn. Ne eblas por nur unu homo revivigi landan agadon, oni bezonas teamon. Sed la plejparto de la membroj de TEJO eĉ ne scias ke la komisiono ekzistas! Ili ne scias kion ĝi faras, ili ne scias kiel aliĝi kaj ili ne scias kiel ili povas kontribui. Tial mi laboros por informi ĉiujn pri la komisiono kaj konvinki ilin partopreni. Per aktiva komisiono, aktivuloj povos subteni unu la alian, interŝanĝi siajn spertojn kaj konsilojn, kaj helpi kreskigi la asociojn. Homoj kies lando ne havas landan sektion, povos ricevi konsilon kaj lerni pri aktivado.

Se elektita, jen estos miaj prioritatoj kaj celoj:

- Konstrui kontaktojn kun reprezento de ĉiu landa sekcio
- Ricevi raportojn de la landaj sekcioj pri siaj agadoj kaj spertoj
- Aktivigi la komisionon kaj plenigi ĝin de pretaj aktivuloj
- Subteni aktivulojn kiuj volas krei landan sektion
- Fari KODEJOn por 2020

Mi ja scias ke la tasko estos malfacila kaj bezonos multe da laboro. Ne eblos tute revivigi la landan agadon en nur unu jaro, sed ni povus fari grandajn paŝojn antaŭen. Mi estas preta labori diligente kaj senlace. Mi aliĝis al la komisiono antaŭ jaroj sed trovis min preskaŭ sola. Antaŭ monatoj mi kandidatiĝis kiel vickomisiito por Eŭropo sed neniam ricevis respondon. Mi persone spertis la malfacilaĵojn de agado kiam mi provis krei landan sektion en mia lando, kaj mi deziras ke neniu alia trovi la samajn malfacilaĵojn.

Mia vivresumo montras miajn spertojn kaj laborojn (mi ne plenumis ĝin per nerilataĵoj kiel la nomon de mia mezlernejo, eksaj postenoj aŭ hejmbesto). Dum preskaŭ du jaroj mi laboris plentempe kiel volontulo por esperantaj organizoj kaj uzis esperanton kiel la ĉiutaga laborlingvo. Mi estis elektita al la komitato en 2018 kaj ekde tiam mi estas unu el la plej aktiva kaj diskutema komitatano. Ne ĉiuj samopiniis kun mi, sed TEJO ne bezonas homojn kiuj nur silente konsentas kun la plej laŭta voĉo aŭ tro timas esprimi sian opinion. Mi estas nova voĉo kun alia vidpunkto kaj mi ofertas novan perspektivon al TEJO. Mi ĉiam parolas honeste kaj malferme pri la situacio, malkiel tiuj kiuj preferas ignori malfacilaĵojn kaj neglekti problemojn ĝis ili iĝas krizoj.

Mi havas multe da sperto en la movado, ĝis nun mi partoprenis 16 semajnajn internaciajn renkontiĝojn: JES 5-foje, IJK 4-foje, UK 3-foje, SES 3-foje kaj IJS 1-foje kaj aliaj semajnfinaĵaj renkontiĝoj kiel la Krokodila Renkontiĝo, la Tutslovaka Kongreso kaj JER. Mi estis invitita kiel la ĉefpreleganto ĉe la Skota Kongreso 2020 sed bedaŭrinde tiu estis prokrastita ĝis 2021.

Mi estas tre aktiva interrete kaj dum la pasintaj kvar jaroj estas la estro de la Esperanta grupo ĉe Reddit kiu havas 17,800 membrojn. Tie mi diskonigas artikolojn, filmetojn kaj aliajn aferojn en aŭ pri Esperanto por informi homojn kaj disvastigi nian lingvon. Samcele, en 2017 mi kreis paĝon ĉe Facebook *Artikoloj, Filmetoj kaj Podkasto* por diskonigi esperantaĵojn. Mi kreis kelkajn jutubajn filmetojn pri Esperantujo, ĉefe por montri al novuloj kiel renkontiĝoj aspektas por allogi ilin partopreni.

Mi ofte verkas artikolojn por informi homojn pri la agado de TEJO kaj mia vidpunkto, ĉefe ĉe mia blogo *Teo kaj Libroj* kiu enhavas 70 artikolojn kaj estas unu el la plej legitaj blogoj en Esperantujo. Mi informis homojn pri la komitato, kio ĝi estas, ĝiaj diskutoj kaj decidoj. Mi estas ofta kontribuanto al *Libera Folio* kie mi donas junulan vidpunkton pri la movado kaj parolas honeste pri ĝi (eĉ se iuj preferus se mi laŭdus anstataŭ kritiki). Miaj artikoloj ankaŭ aperis en *Kontakto*, *Monato* kaj *Beletra Almanako*.

Mi originale konsideris kandidatiĝi kiel kasisto pro mia sperto laborante en financo (ĝis la pandemio mi laboris en banko). Mi ankaŭ interesiĝas pri kulturo, talento kaj genra egaleco. Sed mi decidis ke TEJO urĝe bezonas iun kiu zorgos nur pri landa agado kaj sole prenos respondecon. Mi opinias ke mi plej taŭgas en tiu posteno. Mi ja helpas al la aliaj estraranoj kun aliaj projektoj se eblas, sed mia unua prioritato estos landa agado.

Mi forte opinias ke TEJO devas esti pli malferma kaj travidebla, niaj membroj ofte ne scias kion ni faras kaj ne sentas iun ligan kun la organizo. Multaj junaj esperantistoj ne estas membroj de TEJO kaj ni devas konstrui ponton al ili. Tro multaj decidoj estas faritaj de malmultaj homoj kaj iuj agas kvazaŭ TEJO ĉefe estas grupo por la dekoj da aktivuloj anstataŭ la centoj da membroj aŭ miloj da junaj esperantistoj. Iuj opinias ke nur la spertuloj rajtas decidi ĉion kaj se io ne plaĉas al ili, ili rajtas kaŝi tion de la membraro. Kaj poste ili ne komprenas kial nia membraro ne sentas bonan rilaton kun ni kaj ne engaĝiĝas kun la organizo. Mi forte kontraŭas tiun sintenon kaj mi opinias ke ni devas malferme paroli pri la movado kiel ĝi vere ekzistas (eĉ se tiu estas malkomforta) anstataŭ kiel ni volas ke ĝi ekzistu.

Dum la pasintaj jaroj, TEJO suferis seriozajn problemojn rilate al la aktiveco de la estraranoj. Kelkaj homoj kandidatiĝis kaj promesis multe, sed post sia elekto preskaŭ malaperis kaj apenaŭ aktivis en sia rolo. Tro multaj estraranoj rezignis kaj pro tio la aliaj devis labori sub peza ŝarĝo. Tiu estas unu el la kialoj por ke landa agado estis neglektita. Sed kiel mia vivresumo montras, mi estas tre aktiva kaj laborema, do mi ne subite malaperos. Mi plene enprofundiĝis en la movado kaj multe laboris por ĝi. Mi venas de lando kie la movado apenaŭ ekzistas, sed malgraŭ tiu, mi iĝis la unua komitatano de

Irlando en la historio de TEJO kaj mi esperas ke mi iĝos la unua irlandana estrarano iam ajn. Mi opinias ke mi havas la lertojn, la motivon, la sperton kaj la freŝan vidpunkton por esti bona estrarano.

Dankon,

Robert Nielsen

Esperantista Vivresumo

- Lernis Esperanton en 2014
- Trapasis KER ekzameno je nivelo C1 en 2016
- Estro de /r/Esperanto grupo ĉe Reddit (17,800 membroj) ekde 2016
- Kreinto de fejsbuka paĝo 'Artikoloj, Filmetoj kaj Podkasto' (876 sekvantoj) en 2017
- Kreinto de jutubaj filmetoj pri Esperanto-renkontiĝoj
- Aldonis subtekstojn al multaj jutubaj filmetoj
- Invitita kiel ĉefpreleganto por la Skota Kongreso 2020 (prokrastita pro la kronviruso)

Volontulado

Jaro	Organizo	Loko	Daŭrecoo
2015-2016	E@I (Edukado@Interreto)	Partizánske, Slovakio	1 jaro
2016-2017	Centre Culturel Espéranto	Toulouse, Francio	8 monatoj

TEJO-aktivado

- Membro ekde 2015
- Elektita kiel Komitatano B en 2018
- Provis krei landan sektion de TEJO en Irlando (sensukcese)
- Reprezanto de TEJO ĉe la Forumo Junulara Eŭropa en 2016
- Kandidato kiel vickomisiito por Eŭropo en la Komisiono por Landa kaj Faka Agado (ankoraŭ ne ricevis konfirmon)

Renkontiĝoj kiujn mi partoprenis

- 5-foje JES (2014/5, 2015/6, 2017/8, 2018/9, 2019/20)
- 4-foje IJK (2015, 2016, 2018, 2019)
- 3-foje UK (2015, 2016, 2018)
- 3-foje SES (2014, 2015, 2019)
- 1-foje IJS (2015)
- Semajnfinaĵ renkontiĝoj: Krokodila Renkontiĝo 2017 (Francio), Tutslovaka Esperanto-Kongreso 2016, Junulara Esperanto Renkontiĝo 2016 (Hungario)

Miaj artikoloj estas eldonitaj en la sekvaj lokoj:

- Teo kaj Libro (mia propra blogo kun 70 artikoloj kaj preskaŭ 50 mil legoj)
- Libera Folio
- Beletra Almanako
- Kontakto
- Monato
- Whistling in the Wind (mia anglalingva blogo kiu ankaŭ diskutas Esperanton)

Ne-esperantistaj detaloj

- Naskiĝis la 21a de oktobro 1991 en Irlando
- Diplomiĝis de Universitato Kolegio Dublino pri ekonomiko kaj politiko en 2013
- Ekde tiam laboris en postenoj rilate al aŭ financo aŭ Esperanto
- Laboris por KPMG kaj AIB (la plej granda banko en Irlando) rilate al nepageblaj ŝuldoj, ĝis la kronvirsusa pandemio

Al la Elekta Komisiono de TEJO,

Mia kandidatiĝo rekte rilatas al la fakto ke, en 2018, mi estis ektitita por vojaĝi al IJK en Badajoz, Hispanio, per la konkurso "Partoprenu IJK-n". Malgraŭ tio ke mi estas en la esperanta movado jam de jardeko, kaj multe agadis loke en San-Paŭlo (kaj, dum la lasta jaro, en la tuta Brazilo, kiel vicprezidanto de BEJO), neniam antaŭe mi sentis ke mi iel povus agadi por TEJO, kaj partopreni la eventon montris al mi ke mia agado ankaŭ povus esti valora internacie.

Do, post partopreni en la komitatkunsido dum IJK 2018 kaj dum JES fine de la sama jaro, mi ekkomprenis ke mi volis eklabori por la organizo. Same grava estis la fakto ke pluraj aktivaj TEJO-anoj instigis min al la laboro por TEJO, kaj mi nun ĝojas ke mi povas kandidatiĝi por eble plenumi tiun volon agadi pli forte internacie.

Mi jam partoprenis en multegaj esperantaj aranĝoj (kaj naciaj kaj internaciaj), kaj mi ankaŭ havas sperton en esperantaj asocioj. Por iĝi estrarano de TEJO, certe mia plej grava sperto estas kiel vicprezidanto de BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo). Cetere, ekde 2017 mi laboras en Duolingo por la kurso de Esperanto por parolantoj de la portugala

Por labori por TEJO, mi plej interesiĝas pri Edukado kaj Scienco, pro tio ke mi profesie laboras pri tiuj fakoj. Same, mi pretas zorgi pri Landa kaj Faka Agado kaj Transnaciaj projektoj, same kiel Adoleska kaj Universitata agado.

- Edukado: dum la lasta jaro mi organizadis sesiojn de KER-ekzameno en junularaj renkontiĝoj, kaj mi ŝatus pli intense labori por la edukado de esperantistoj, kaj rilate al la lingvo kaj rilate al kulturaj kaj sciencaj aferoj.
- Landa agado: mi akompanis lastatempe la reviviglo de la agado de Sudameriko, kie BEJO rolas kiel ĉefa junulara sesio kaj provas motivigi la najbarajn latinamerikajn landojn al intensa agado, same kiel la nia.
- Adoleska agado: mi havas sperton instrui adoleskantojn (instrui lingvojn) kaj mi pensas ke estus bone doni atenton al tiom aĝaj personoj dum niaj renkontiĝoj, same kiel pli instigi ilin al membreco al TEJO kaj frua ekengaĝiĝo en la movado.
- Universitata Agado: dum 10 jaroj mi esperantumis en mia universitato, instruis la lingvon, kreis diskutgrupojn, prelegis, esploris la lingvon science, resume, mi multe spertas pri la medio. Mi ŝatus krei aron de tiaj grupoj en aliaj universitatoj, kaj kunigi tiujn kiuj jam ekzistas (ĉar ili ja ekzistas en multaj lokoj) por organizita kunlaboro.

Laboreme,

Karina Gonçalves de Souza de Oliveira

VIVRESUMO

Personaj datumoj

Nomo: Karina Gonçalves de Souza de Oliveira
Naskiĝdato: 24an de januaro 1991
Devenloko: Biritiba Mirim, Brazilo
Loĝloko: Busan, Sudkoreujo
Telefonnumero: +8201054221198
Retadreso: kgsoliveira@gmail.com
Uzantnomo en sociaj retejoj: @librulino



Edukado

02/2009 – 07/2014 Universitato de San-Paŭlo
Departemento pri Lingvistiko
Bakalaŭriĝo pri la Portugala (lingvo kaj literaturo) kaj Lingvistiko
San-Paŭlo, Brazilo

02/2013 – 11/2015 Universitato de San-Paŭlo
Departemento pri Edukado
Diplomo por instrui la Portugalan
São Paulo, Brazil

08/2014 – 11/2016 Universitato de San-Paŭlo
Departemento pri Lingvistiko
Magistriĝo pri Lingvistiko
“Adapto de pruntvortoj en Esperanto”
San-Paŭlo, Brazilo
<http://www.teses.usp.br/teses/disponiveis/8/8139/tde-14032017-141417/pt-br.php>

01/2017 – 01/2021 Universitato de San-Paŭlo
Departemento pri Lingvistiko
Doktoriĝo pri Lingvistiko
“Historio de Fonetiko kaj Fonologio en Brazilo (1949-2000): konservado kaj ŝanĝado de konoj en disertacioj”
San-Paŭlo, Brazilo

Profesia sperto

Ekde septembro 2019 Universitato pri Fremdaj Studoj de Busano
Instruisto de la portugala
Busano, Sudkoreio

08/2014 – 01/2021 Universitato de San-Paŭlo

	Scienca esploristo pri Lingvistiko San-Paŭlo, Brazilo
02/2018 – 12/20018	ZAP idiomas (lingva lernejo) Instruisto kaj de la hispana kaj de la angla Biritiba Mirim, San-Paŭlo
02/2012 – 03/2014	Lingva lernejo de FFLCH-USP (Fakultato pri Filozofio, Beletro kaj Homaj Sciencoj) Instruisto de Esperanto San-Paŭlo, Brazilo
02/2011 – 06/2011	Universitato de San-Paŭlo
08/2015 – 12/2015	Helpinstruado al bakalaŭriĝaj studentoj
02/2019 – 06/2019	São Paulo, Brazil

Lingvoj (kaj niveloj):

Portugala	denaska
Esperanto	C1
Hispana	B2
Angla	B2
Franca	A2
LIBRAS (Língua Brasileira de Sinais – Brazilia signolingvo)	A1

Spertoj en la esperanta movado:

2012 – 2016	Estrarano en EASP (Esperanto-Asocio de San-Paŭlo)
09/2013– 09/2014	Instruista Trejnado (rekonita de ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) en la Universitato Adam Mickiewicz, Poznań, Pollando
2017 – nuntempe	Teamano en la kurso de Esperanto por parolantoj de la portugala en Duolingo
2018 – 2020	Vicprezidanto de BEJO (Brazilia Esperantista Junulara Organizo)
2019 – nuntempe	Estrarano de TEJO

Motiviĝa letero

Mi nomiĝas André Jorge Pagaime, mi loĝas en Portugalio kaj mi estas esperantisto de 3 jaroj.

Mi volus esti por la Estraro de TEJO, ĉar mi estas dinamika homo, tre fleksebla en la laboro. Mi estis kaj estis konektita al pluraj sportaj kluboj, ĉefe Atletiko kaj Eŭska Pilko, sed mi ankaŭ kunlaboris kun la Esperanto-Futbala Asocio. Mi ankaŭ estas muzikinstruisto kaj amatora muzikisto. Kun mia kandidatiĝo mi ŝatus kunlabori kun Tejo kaj la Esperanto-movado por kreski ĉe junuloj por ke ĝi estu pli konata kaj disvastigita. Sur la estraro, pro mia sperto, mi povis organizi kaj partopreni en agadoj rilataj al la medio kaj la arbaro aŭ kulturaj kaj sportaj. Mi ankaŭ povos kunlabori kun sociaj retoj, mi havas haveblecon kaj flekseblecon por vojaĝi kaj sekvi la tutan laboron de TEJO

Mi aliĝis al la Esperanto-movado por helpi la Internacian Kongreson en Lisbono, kaj nun mi volas helpi TEJO kreski per agadoj kaj ideoj por disvastigi la internacian lingvon, mi estas disponebla por labori kaj helpi ĉion eblan por disvastigi la lingvon.

Krom miaj agadoj kaj scioj, mi estas disponebla por lerni kaj lerni pli. Pro ĉio, kion mi diris, mi opinias, ke ĝi estos avantaĝo por la laboro, kiun mi faris en pluraj portugalaj asocioj, mi pensas, ke mi havas multon por doni al la Esperanto-movado kaj TEJO. Mi volas fortan Esperanto-movadon kun agadoj rilataj al naturo, kulturo kaj sporto por junuloj. Mi povas helpi pri tio.

André Pagaime , Moita Portugal 31/05/2020

PERSONAJ Informoj

Andre Pagaimé

Estrada d Esteiro Furado Qt Branco, 2860-354 Chao Duro Moita (Portugalujo)

911899127

pelota.portugal@gmail.com

Vira sekso | Dato de naskiĝo 25/12/1993 | Portugala nacieco

PROFESIONA

ANTO01/01/2019 - Aktuala Instruisto pri Muziko / Muzika Instruisto

Agrupamento Escola Moita, Moita (Portugalujo)

21/10/2019 - Aktuala Ĉasista gardisto

Guarda Nacional Republicana, Montijo (Portugalujo)

PERSONALAJ LARDOJ

Patrina lingvo Portugala

Fremdlingvoj SUBTENDE TALK Skribi

Parola kompreno Legado Parola interago Parola produktado

Angla B2 B2

Esperanto C1 C1

Hispana C2 C2

Nivelejoj: A1 kaj A2: Baza uzanto - B1 kaj B2: Sendependa uzanto - C1 kaj C2: Altnivela uzanto

Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj - Mem-taksa krado

Bonega komunikadkapablo Kapablo kontakti infanojn kaj junulojn kiel atletiko kaj Pilkotrejnistoj

Organizaj kapabloj Bonaj organizaj kapabloj kiel gvidanto de pluraj asocioj:

Prezidanto de la Portugala Asocio de Pilko kaj Tamburello (2012-2018)

Prezidanto de la Portugala Eŭska Pilka Asocio (2019 / -)

Kasisto Banda Filarmonica do Rosario (2015/2018)

Plenuma Membro de Moita Paroka Konsilio (2018 / -)

Membro de la Portugala Harmonia Klubo

Membro de la Partia Komitato Chao Duro

Fondinto de Banda Filarmonica da Moita

Membro de la Portugala Federacio de Tabla Hokeo

Membro de la Portugala Japana Ŝako-Asocio

Membro de Portugala Esperanto-Asocio

Sat Partnero

Partnero de Esperanto Futbala Asocio

Mi organizis kaj kunorganizis la jenajn eventojn:

Eŭropa Junulara Pilotĉampioneco (Moita 2019)

Eŭropa Tamburello-Ĉampioneco (Moita 2019)

Nacia Harmonia Festivalo (Moita 2015)

Popularaj Festoj de Chao Duro 2019

Latina Pokalo de Pilko (2016)

Mi kunlaboris en la Internacia Esperanto-Kongreso en Lisbono

- Bonaj gvidaj kapabloj akiritaj kiel eŭska pilkludisto. Nuntempe en ĉ teamo de 20 homoj.

- Mi partoprenis la Internacian Esperanto-Kongreson, en Lisbono.

-Kun kapabloj en la areo de Muziko kaj Sporto pro la sperto de pluraj asocioj

Karlos' Peskera Alonso

Discesa San Gerardo 62 – 85100 Potenco – Italio

☎ +34 (628) 426 442 • ✉ fydus@hotmail.com

Estraro de TEJO

la 1-a de majo 12020 HE

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Rotterdamo, Nederlando

Karaj samideanoj,

Per ĉi tiu letero mi kandidatiĝas al la estraro de TEJO. Mia multfaka edukado, laboraj lertecoj kaj aktiva partopreno en la Esperanta movado kvalifas min por ĉi tiu honora respondeco.

Preskaŭ antaŭ kvin jaroj, mi eklernis Esperanton per Duolingo. Post 11 monatoj, mi partoprenis la 72an IJKn, kiun mi atingis bicikle. Tial, mi komitataniĝis nome de BEMI dum la sekvinta JES. Mia plej grava agado en Esperantujo estas la organizado de la 74a IJK en Badaĥozo, nur post du jaroj. Malgraŭ granda malkresko de la teamo, la kongreso sukcesis ekonomie, reklame kaj en partoprenantoj. Tiaflanke, mi ankaŭ revivigis la junan sektion Hispanan, per aktivigo de junuloj.

Mia socia aktivado komencis jam kiam mi aĝis 14 jarojn. Tial, mi alvenis al Esperantujo kun sperto rilate al organizado de eventoj kaj subvenciitaj projektoj en junaj asocioj. Ankaŭ mia labora sperto donis al mi utilan konon por nia movado. En Bruselo mi lernis pri la ena funkciado de la Eŭropa Unio. Ankaŭ, la fundo de entrepreno instruis al mi pri iniciato, teamlaboro kaj problemsolvado. Aldone, mia profilo kiel scienca esploristo helpas min resti racia kaj gvidada de datumoj.

Konsiderante mian sperton, mi plej taŭgas por la fakoj kongresoj kaj transnaciaj projektoj, sed mi ankaŭ pretas respondi pri Pasporta Servo kaj volontuloj. Mia plano estas kontribui ĉefe al stabiligo de TEJO, faciligante debaton kaj realigon de difinitaj projektoj. Ni kandidatiĝas individue sed, laŭ mi, la laboro estas pli teama, kio evidentiĝis dum ĉi mandato. Pro tio, kaj ĉar mi ne certas pri kiuj aliaj kandidatiĝos, mi ne limigas min al specifa posteno nun. Mi taksos la lertecojn de la aliaj kandidatoj por kompreni en kiu posteno mi estus plej taŭga por nia organizo.

Konklude, per miaj praktikaj kapabloj, motivado kaj spertoj, mi kontribuos al la TEJO-teamo kun altnivela kvalito. Pro tio, mi esperas ricevi vian subtenon.

Kune kaj june,



Karlos' Peskera Alonso

Karlos' Peskera Alonso

Discesa San Gerardo 62 – 85100 Potenco – Italio

☎ +34 (628) 426 442 • ✉ fydus@hotmail.com

Eduko

Katolika Universitato de Murcio

Doktoriĝon en Sociaj Sciencoj

YOUTHShare Project

Murcio

Nov 12019–Nuntempe

Universitato de Kantabrio

Bakalaŭron en matematiko

Sep 12011–Sep 12013 kaj Sep 12015–Jul 12016

Erasmusa semestro en Berlino, HU Berlin; Nefinita, 120 ECTS-ojn kompletigitajn

Santandero

Universitato publika de Navaro

Magistron en Dinamikoj de Ŝanĝo en Altnivelaj Modernaj Socioj

Okt 12010–Sep 12011

Pamplono

Universitato de Salamanko

Licencion en Sociologio

Sociologia esplora projekto: "Voĉo au silento. Partopreno en la eduksistemo"

Sep 12006–Sep 12010

Salamanko

Universitato de Salamanko

Licencion en Politika Scienco

Salamanko

Sep 12008–Jul 12010

Kursoj

Aŭtonoma Universitato de Madrido kaj Iversitato

Montekarlajn Metodojn en Financoj

Jan 12014–Apr 12014

Sperto

labora.....

Sistema Turismo

Esploristo

YOUTHShare Project

Potenco

Nov 12019–Nuntempe

Katolika Universitato de Murcio

Juna Esploristo

YOUTHShare Project

Murcio

Mar 12019–Nov 12019

Kialo Consulting

Esplora direktoro kaj Sola oficisto

Jun 12015–Dec 12018

Plibongi sociajn esplorojn, analizi kvantecajn kaj kvalitecajn datumojn, skribi raportojn pri sociaj studoj kaj politikaj strategioj

Aktivecoj rilate al administraj kaj financaj taskoj

Santandero

Oficejo de la Registraro de Kantabrio en Bruselo

Juna Politika Oficisto

Aktivecoj rilate al eŭropaj aferoj de perspektivo de regiona publika aŭtoritato

Bruselo

Jul 12013–Dec 12014

Libervola

TEJO <i>Komisiito pri kongresoj</i>	Tutmonde <i>Sep 12018 – Nuntempe</i>
IJK <i>Ĉeforganizanto</i>	Badaho <i>Jan 12017 – Aŭg 12018</i>
Internacia movebleca agado ene de la programo eŭropa Junularo en Agado <i>Estro de la koncedita eŭropa projekto "Malkovrante aliajn edksistemojn"</i>	Santandero <i>Sep 12013</i>
Studenta unio CAJUCA <i>Prezidanto</i>	Kantabrio <i>12012–12013</i>
Studenta unio CAJUCA <i>Trezoristo</i>	Kantabrio <i>12011–12012</i>
Studentaro de la fakultato de sociaj sciencoj, Universitato de Salamanko <i>Prezidanto studentara</i>	Salamanko <i>12006–12008</i>

Lingvoj

Hispana: denasklingve	
Esperanto: flue	
Angla: flue	<i>Scored 101 on TOEFL IBT Test</i>
Itala: bone	
Germana: meznivele	<i>Goethe-Zertifikat B2</i>
Nederlanda: meznivele	<i>Huis van het nederlands Module 2.4B, B1+</i>

Komputilaj kapablecoj

Statistikaj: SPSS, STATA, R	<i>tre bonan scion</i>
Oficejaj: Microsoft Office, OpenOffice/LibreOffice	<i>tre bonan scion</i>
Programaj: JavaScript, Python, HTML	<i>bazan scion</i>
Aliaj: L ^A T _E X	<i>bazan scion</i>

Publikajoj

Pesquera Alonso, C., & Strand, A.H. (eds.) (2020). *Transnational report on the impact of education and training initiatives on young NEETs*. Project 'A Place for Youth in Mediterranean EEA: Resilient and Sharing Economies for NEETs' (YOUTHShare). <https://doi.org/10.13140/RG.2.2.10974.79685>

Pesquera Alonso, C. (2019) La PAC que nos espera. Pri venonta Esperanta sociologia esploro. En Baláž, P., *Evoluo de paradigmoj en scienco kaj tekniko*. Partizánske: ESPERO por E@

Pesquera Alonso, C. (2014) La PAC que nos espera. *Cuadernos Cantabria Europa 12* (pp. 88-116). Santander: Dirección general de Economía y Asuntos Europeos.

Kara Komitato,

Pere de tiu ĉi letero, mi kandidatiĝas por la posteno de Prezidanto kun la celo kontribui al TEJO kun mia **sperto**, mia **diplomata aliro**, mia **strebo al interkompreniĝo**. Ekzakte tiel mi vidas min kiel prezidanto kaj ĉefa gvidanto por mia estrara teamo.

Mi estas svedino loĝanta en Germanio. Mia enkonduko al la movado komenciĝis kun la Poliglota Kunveno en Berlino, sed estis en la reto, antaŭ la IJK en Vroclavo, kie mi ekkonis multajn el la aktivuloj, kiuj daŭre estas miaj plej proksimaj esperantaj amikoj. Kiam mi ekaktivis en TEJO, mi ĝojis pri la eblo kontribui kiel trejnisto. Mi estas entuziasma komenciganto de diversaj projektoj. **Kiel Prezidanto, tia entuziasmo helpas al mi ĉiam doni al miaj kunestraranoj la subtenon, kiun ili bezonas.**

Antaŭ aktiviĝo en TEJO, mi jam estis Prezidanto de loka klubo de la junulara organizo AIESEC, kaj laboris en granda firmao kiel IT-subtenanto. Dum mia mandato en la estraro 2017/2018 mi spertiĝis pri pluraj fakoj, inkluzive pri la posteno de ĝenerala Sekretario, kiun mi plenumis dum duono de la mandato. Tiu vasta sperto pri la agado de TEJO estos kaj helpa kaj nepara por ofici kiel Prezidanto. Multaj kampoj estas konektitaj - ekzemple, KODEJO estas la bazo por la jarlibro - kaj ĉiu Landa kaj Faka Sekcio havas siajn specifajn fortojn kaj defiojn. Necesas havi superrigardon por kompreni kiel kunlaboro inter la komisionoj plej bone povas funkcii. Finfine, **TEJO estas komuna projekto de la Landaj Sekcioj kaj membroj tutmonde.** Kompreni iliajn bezonojn devas iĝi la kerno de nia agado.

En la lastaj jaroj abundis gravaj atingoj por la organizo - la memstariĝo, la pligrandigo de la stabo de TEJO, la registriĝo ĉe UNESKO. Ĉiuj el tiuj paŝoj estas valoraj kaj kreas la bazon por eĉ pli grandaj atingoj. Foje evoluoj okazas pli malrapide ol ni ŝatus, ĉar por atingi ion, necesas interkompreniĝi mondscale. Pere de mia aliro laŭ teama interkonsento kaj komunaj decidoj, mi esperas helpi faciligi interkonsenton. Kiel Prezidanto, mi volas zorgi pri la persona kaj gvidkapabla kresko de la estraro, kaj ke ni en la bezono estingi fajrojn ne perdos la celon de la okuloj. **Ni strebu al pli daŭripova, engaĝiga kaj transparenta TEJO.**

La jaro 2020/2021 estu tempo dum kiu ni metas nian fokuson al la organizo mem: al la estraro, al la aktivuloj, al la landaj kaj fakaj sekcioj, al la volontuloj. Ni ne povas vojaĝi kiel kutime kaj multaj el la planitaj internaciaj kaj lokaj kunvenoj ne povas okazi. IJK 2020 iĝos reta renkontiĝo, pri 2021 ni ankoraŭ malcertas. La ĉefa tasko de la estraro ne estas nur kunsidi kaj skribadi, sed inspiri, konekti, subteni, eltrovi, komuniki. Ni devas instigi regulan komunikadon kun kaj inter niaj membroj, eĉ pere de tiom bazaj aferoj kiel ĝisdatigi la retpaĝon. **Mi volas esti via ĉefa inspiriganto, unua entuziasmulo.** Mi esperas ke kun via fido mi povos esti prezidanto de teamo, kiu trovos la forton kaj la tempon kreski kiel individuoj kaj kiel organizo.

Kunlabore,



Charlotte Scherping Larsson



Charlotte Scherping Larsson

Libervola sperto

8/2017 – 8/2018 **Estrarano kaj Ĝenerala Sekretario**, TEJO.

9/2017 – 12/2018 **Projektano kaj Trejnisto**, TEJO.

Temofokusita organizado kaj kunordigado de *Florigu Egalecon inter Junuloj* ("Fostering Equality in Youth"), internacia kunlabora projekto kadre de Erasmus. Kunordigado de la trejnistoj dum IJK en Badajoz, Hispanio.

3/2017 – 8/2017 **Trejnisto**, TEJO.

Du trejnadoj kadre de la projekto Erasmus AEJK: *Trejnu la trejniston*-trejnado en Italio kune kun kvar aliaj trejnistoj, kaj unu trejnado en Aného, Togo kun tri aliaj. Trejnado en Munkeno kadre de la projekto Erasmus *Trejnu la trejniston* kun du aliaj trejnistoj.

5/2007 – 5/2008 **Prezidanto**, AIESEC GÖTEBORG.

2007 **Organiza teamo**, CISV.

Akademia sperto

2017– nun **Magistro en Eduka Scienco**, *Leibniz Universität Hannover*, Germanio.

2014 - 2017 **Bakalaŭro en Psikologio**, *Universitato de Kristianstad*, Svedio.

2006 – 2007 **Studado pri ekonomio kaj lingvistiko**, *Universitato de Göteborg*, Svedio.

Laborsperto

8/2018 – 5/2020 **Studenta laboristo**, PSIKOLOGIA INSTITUTO de la *Leibniz Universität Hannover*.

3/2009 – 9/2017 **IT/LIMS-Administranto**, BUREAU VERITAS, Germanio.

Administrado, IT-subteno kaj trejnadoj. Respondeculo por la seminarioj *Trejnu la trejniston*.

11/2007 – 9/2008 **Intervjuisto por merkatakaj esploroj**, NORSTAT GMBH, Göteborg, Svedio.

Lingvoj

denaske **Sveda**

flue **Esperanto, Germana, Angla**

bazaj konoj **Rusa, Franca, Hispana**

Konstanze Schönfeld

Tuŝka • 江真帆

Karaj komitatanoj,

Pere de tiu ĉi letero mi ŝatus kandidatiĝi al la Estraro de TEJO 2020/2021 por la rolo de Ĝenerala Sekretario. Jam dum la mandato 2018/2019 mi oficis en TEJO kun la sama rolo, post unua mandato en 2017/2018 kiel Vicprezidanto.

Mia motiviĝo rekandidatiĝi kiel Ĝenerala Sekretario fontas el forta emo kontribui al la nova teamo subtenante ĉiujn estraranojn, volontulojn, oficistojn kaj aliajn aktivulojn. Ĝenerala Sekretario estas ne nur tiu persono, kiu zorgas ke ĉio estu plenumita laŭregule. Ĝia rolo ne temas pri kontrolado, sed pri **subtenado** al la agado de ĉiuj aktivuloj, sendepende de iliaj laborkampoj. Ĝenerala Sekretario estas tiu persono, kiu havu spertojn en sufiĉe vasta temaro por konsili; kiu havu superrigardon pri la necesaj paŝoj kaj disponebla homforto; kaj kiu scipovas proponi novajn vojojn por ebligi pli efikan laborfluon. Ĝenerala Sekretario ĉiam estas tie, kie demandoj kaj duboj aperas, aŭ kiam bezonatas trovi solvojn kaj ebligi ŝanĝojn. Kiam nova ideo prenas formon en la menso de aktivulo, la Ĝenerala Sekretario analizas ĝin kaj sugestas vojon, kiel adapti kaj florigi ĝin en la kunteksto de la organizo.

Dum venonta mandato, mi ŝatus fokusiĝi pri tiuj taskoj de Ĝenerala Sekretario, kiuj havos daŭripovan efikon. Estas mia celo lerni novajn modelojn kaj metodojn por strukturigi la laboron de komisionoj, oferti niajn servojn rete, krei ilojn por faciligi transdonon de konoj kaj taskoj, kaj provizi solvon al la plurjara defio pri membronombro kaj kotizoj. Travidebleco, entuziasmo pri nia komunumo, kaj malfermeco rilate al la bezonoj de niaj aktivuloj tutmonde devas daŭre konstitui niajn gvidajn principojn, sed ekzakte en tiuj kampoj TEJO malfortas kaj urĝe bezonas plievoluiĝi. Por atingi niajn celojn, necesas ke kunlaboro kaj interkompreno kun ĝiaj Sekcioj iĝu prioritato.

Dum lastaj jaroj, TEJO multe kreskis kaj stabiliĝis. Tamen, ĝi ankaŭ konis aparte gravajn malfacilaĵojn rilate al la konsisto de sia estraro. Tial mi ŝatus nun aparte subteni tiujn aktivulojn, kiuj decidis alpreni la respondecon gvidi kompleksan organizon en tiu ĉi malcerta tempo. Kune, ni bezonas agi por trovi kreemajn solvojn al la nuntempaj defioj kaj renovigi la kialojn de la junulara Esperanta movado por daŭre kuniĝi mondscale sub la gvido de TEJO.

Elkore salutas vin,



Konstanze

Miyakojima, la 31-a de majo 2020

konstanze schönfeld

tuška · 江 真帆

Naskiĝo

13.11.1993
Bologna, Italio

Hejmloko

Heidelberg, Germanio

Loĝloko

沖縄県
宮古島市
平良西里
日本 · Japanio

Kontaktoj

konstanze@tejo.org
@konstanze7

edukado

2019–2020	Fudan Universitato, Ŝangajo Interŝanĝjaro	Ĉinio
2018–2021	Universiteit Ghent kaj Universität Leipzig Duobla Magistro en Mondaj Studoj	Belgio kaj Germanio
2016–2017	Kyushu Universitato, Fukuoka Interŝanĝjaro	Japanio
2016	Univerzita Karlova, Prago Interŝanĝsemestro	Ĉeĥio
2014–2018	Ruprecht-Karls-Universität Heidelberg Bakalaŭreo en Orientaziaj Studoj, fokuso pri Japanio kaj Politikscienco	Germanio

volontulado

en esperantujo

2/20–5/20	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo Komitatano Ĉ	tutmonde
9/18–8/19	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo Ĝenerala Sekretario	tutmonde
8/17–8/18	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo Vicprezidanto kun respondeco pri eksteraj rilatoj kaj projektoj	tutmonde
9/17–7/18	Kunordigo de la delegacio de TEJO al EYE kaj YO!Fest 2018 Kunorganizado de la eventoj en Strasburgo kiel grupestro de TEJO (gvidado de 30 partoprenantoj el 10 landoj); kunordigado de la budejo ‘Laborante por pli forta Eŭropo’; prizorgado de la surlokaj aktivajoj	Francio
1/17–nun	Germana Esperanta Junularo Estrarano kun respondeco pri projektoj kaj rilatoj kun TEJO	Germanio
1/17–8/17	Germana Esperanta Junularo Komitatano A por Germanio	Germanio
10/15–nun	Komisiono pri Eksteraj Rilatoj, TEJO Partopreno en konferencoj kaj trejnadaj (ĉefe FoJE kaj UNITED)	Eŭropo
9/15–5/16	Kunordigo de la delegacio de TEJO al EYE kaj YO!Fest 2016 Kunorganizado de la eventoj en Strasburgo kiel grupestro de TEJO (gvidado de 35 partoprenantoj el 15 landoj); planado de la surlokaj aktivajoj	Belgio, Francio
3/15–8/17	Kunordigo de la tradukado de TEJO.org Trejnado pri la TEJO-retejo kaj Trello; serĉado de tradukantoj	rete
2/15–3/15	Volontulado por TEJO en la Centra Oficejo, Roterdamo Verkado de la EVS-subsancipeto 2015/2016; ekkunordigo de la tradukado de la retpaĝo; akirado de konoj pri funkciado de la Centra Oficejo	Pollando, Nederlando

ekster esperantujo

8/17–9/18	Oficejo pri Internaciaj Rilatoj, Universitato de Heidelberg Tutorado de pluraj eksterlandanaj studentoj kaj studentkomencantoj	Germanio
10/15–7/16	AIESEC Heidelberg Kunordiganto de la tutorado de la alvenantaj staĝistoj	Germanio
9/15–2/16	Instituto pri Tradukado kaj Interpretado, Universitato de Heidelberg Tutorado de pluraj eksterlandanaj studentoj kaj studentkomencantoj	Germanio

laborsperto

4/20–nun	CoronaNet Research Project Serĉada asistanto: ĉefrespondeco pri Japanio; gvidanto por novuloj	tutmonde
10/17–9/18	Oficejo pri Internaciaj Rilatoj, Universitato de Heidelberg Studenta laboristo: organizado de orientigaj vizitoj por germanlingvaj eksterlandaj lernejoj; surloka gvidado	Germanio
6/14–9/14	Lingvlernejo International House Collegium Palatinum, Heidelberg Staĝisto: organizado de la kultura programo; akompanado dum ekskursoj; tutorado pri la germana lingvo; prizorgado de la itallingva retpaĝo	Germanio
7/13–4/14	Instituto Max Planck por Kuraca Esplorado, Heidelberg Scienca helpanto: datanalizo de 3D-bildoj	Germanio
3/13–4/13	Universitata Instituto de Grupa Psikologio, Bologna Staĝisto: kreado de retpaĝoj kaj grafikaj materialoj	Italio

lingvoj

denaske	itala
flue	germana, franca, angla, esperanta, japana
meznivele	hispana
baze	ĉina

Saluton,

mi nomiĝas Tomáš Stano, devenas el Slovakio, nuntempe loĝas, laboras kaj studas en Prago, Ĉeĥio.

Mi ŝatus kandidatiĝi por la posteno de estrarano, aŭ kaze de malmulte da kandidatoj, ankaŭ por vicprezidanto de TEJO. Mi ŝatas nacian kaj internacian agadon, kie mi povus uzi miajn, jam akiritajn spertojn kiel estrarano de TEJO en la jaro 2019, kiam mi estraraniĝis februare 2019, kaj estis en estraro ĝis fino de mandato, kiam mi respondecis ĉefe pri Merkatiko, Pasporta Servo, Talento kaj helpis kun aliaj fakoj.

Mi ankaŭ estis kaj daŭre estas aktiva en landaj sekcioj de TEJO en Slovakio kaj Ĉeĥio, kie mi ĉefe respondecis pri fakoj kiel merkatiko, financoj kaj projektoj. Ek de la jaro 2016 mi ankaŭ agadis en TEJO kiel komitatano A por Slovakio kaj Vickomisiito de Aktivula Trejnado. Mi ankaŭ partoprenis kelkajn projektojn kadre de TEJO Erasmus+ projektoj, kie mi havis ŝancojn viziti novajn landajn sekciojn, ekkoni novaj homojn kaj ĉefe ekscii, kiel oni laboras en aliaj partoj ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en la mondo. En la jaro 2019 mi estis ano de organiza teamo de 75-a Internacia Junulara Kongreso en Slovakio, kie mi prizorgis financojn.

Per tiu ĉi motivletero mi ŝatus anonci ke mi antaŭvidas periodon de mi vivo, kiu enhavas finon de miaj studoj, kio povas influi mian laboron en TEJO kaj povas okazi ke mi dum 2 monatoj ne estos plene aktiva (decembro 2020 – januaro 2021, eventuale unua duono de februaro), sed nur parte aktiva. Tamen mi ŝatus eniri la estraron kaj tiel helpi disvolvi Esperanton kaj helpi al TEJO kreski, ĉar mi vidas ke nun mia vivsituationo permesas tion kaj mi pretas esti stabila ano de estraro ĝis fino de mandato. ☺ Ĉar mi studas financojn, mi povas eventuale helpi al kasisto kun diversaj farenadoj kaj eble akiri spertojn ankaŭ en interaciaj financoj.

Fakoj pri kiuj mi pretas labori estas Aktivula Trejnado, Talento, Kongresoj, Pasporta Servo kaj eventuale kunlabori kun alia estrarano pri Merkatika fako. Kaze se bezonatus helpo kun aliaj fakoj, mi volonte pretos helpi kun aliaj estraranoj.

Kunlabore,
Tomáš Stano

TOMÁŠ STANO

KONTAKTO

+421905289902
tomasstano95@gmail.com

MALLONGA PRISKRIBO

Slovaka studento loĝanta, studanta kaj laboranta en Prago, Ĉeĥio.
Aktivulo en diversaj neprofitcelaj kaj neregistaraj E-organizaĵoj.

SPERTOJ (ĜENERALAJ)

NATEK Czech republic & Slovakia s.r.o.

HR Asistanto 08/2018 - ĝis nun
IT Rekrutisto 06/2017 - 07/2018

- laboro en homaj rimedoj
- kreado de kontraktoj por laboristoj,
- kontaktado de homoj spertaj en sia fako kaj proponado de pozicioj en diversaj kompanioj
- merkato ĉe sociaj/laboraj retoj (LinkedIn, monster, ktp.)
- komunikado kun kompaniaj sekcioj en aliaj landoj (Bulgario, Pollando, ktp.)

Randstad s.r.o.

Konzultanto en vokcentro 10/2016 - 05/2017

- propono de pozicioj por laboristoj
- ĉiutaga vokado al novaj homoj
- komunikado kun direktoroj
- merkato ĉe sociaj/laboraj retoj

EDUKADO

Ekonomia Universitato en Prago
Financa fakultato
Bankoj kaj asekuroj
2017 - ĝis nun

Masarik-Universitato en Brno
Financ-Administrada fakultato
Financoj kaj leĝo
2014-2017

SPERTOJ (EN E-ORGANIZOJ)

TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo

Estrarano 02/2019 - 08/2019
Komitatano A, Slovakio 02/2016 - 01/2019
Vickomisiito - Aktivula Trejnado. 11/2017 - 01/2019
kaj 09/2019- ĝis nun

SKEJ - Slovakia Esperanta Junularo

Estrarano 07/2014 - ĝis nun

- merkato de la organizaĵo ĉe sociaj retoj (unuaj 3 jaroj)
- financoj, helpo kun librotenado de la organizaĵo
- helpo kun projektoj kaj diversaj subvencioj rilate al Slovaka movado
- flanke de organiza teamo de IJK, LKK-ano respondecas pri financoj kaj subvencioj
- ek de la jaro 2019 prezidanto de la organizaĵo

ĈEJ - Ĉeĥa Esperanto-Junularo

Kasisto 12/2017 - 05/2019
Estrarano pri merkato. 09/2016 - 12/2017
Prezidanto de revizia komisiono. 09/2015 - 09/2016

- prezidanto de revizia komisiono - superrigardo ĉu estraro funkcias kiel devas laŭstatute
- merkato ĉe sociaj retoj
- financoj de ĈEJ - librotenado, superrigardo de financoj de Instruista projekto kaj helpo kun kunordigo de la projekto, impoŝtoj

ALIAJ

- organizado de eventoj
 - SES (2015,2017)
 - Junulara Programo - UK 2016
 - IJK (2017, 2019)
 - multaj aliaj (Centrejo, TER, ĈAR,...)

- partopreno en projektoj de TEJO (AEJK, ECY)
- trejnisto - ek de 2017, liveritaj pli malpli 15 horoj da trejnadaj
- partoprenado de eventoj YO!Fest (EYE 2016, 2018, YO!Fest 2017)